

BULGARA ESPERANTISTO

ORGANO DE BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO

En la numero:

GLORA NACIA
EPOPEO
•
PRI NIA ASOCIO
•
SOFIA
E-DOMO DE
KULTURO
•
100 JAROJN
ESPERANTO
•
NIAJ
VETERANOJ
•
ESPERANTO
EN PROFESIOJ
•
POEZIO
•
GASTINO EL
LA KOSMO



GLORA NACIA EPOPEO

Pasis 110 jaroj de la Aprila Ribelo — apogeo de la batalo de nia popolo kontraŭ la kvinjarcenta jugo por konkero de nacia sendependeco kaj por likvido de la milit-feŭda sistemo de la Otomana Imperio.

La ribelo eksplodis en aprilo 1876 en urbo Koprivštica kaj fulmrapide disvastiĝis al Panagjuriŝte, al la regiono de Sredna Gora-montaro kaj al la norda parto de Rodopimontaro, al urboj Târnovo, Gabrovo kaj Sevlievo en la Balkan-montaro. La otomana registaro ĵetis kontraŭ la ribelintojn sian regulan armeon. Komenciĝis gravaj bataloj en Panagjuriŝte, Klisura, Peruŝtica, Batak, Bracigovo, apud la Monaĥejo de Drjanovo kaj aliloke. Sed malgraŭ la senprecedencaj heroaĵoj kaj sinofero de la ribelinta popolo, ĝiaj fortoj ne povis elteni la furizon de la multnombra turka armeo. La ribelo estis kruelege sufokita: ĉiuj ribelintaj urboj kaj vilaĝoj estis bruligitaj kaj ilia loĝantaro masakrita.

Vi vane serĉus paralelojn alie. La Aprila Ribelo estas bulgara fenomeno. Ĝi estas kolosa erupcio de la amasiginta dum la kvinjarcenta jugo impeto al libero. Ĝi estas la fajra lumo en la sennombraj homaj animoj, kiun nia granda poeto Ivan Vazov nomis „ebriigo de unu popolo“. Ĝi estas la nekredebla altigo de la nacia spirito al la suproj de la historio.

Maturiginta por sia nacia savigo, la bulgaro ekiris al ĝi laŭ la sanga vojo de abnegacio kaj sinofero.

Ne, tio ne estas la sama lando, kie, laŭ la vortoj de la ĝenia poeto Hristo Botev, „surde, terure la ĉenoj tondras, ne sonas jam por lukto la volo“. La pacienco estas elĉerpita. La kruelaj, sed dolĉaj vortoj „Liberon aŭ morton!“ jam unuigis ĉiujn honestajn korojn. La minace kunpremitaj lipoj kisas la ponardon kaj la pistolon, en la okuloj brilas kuraĝo. . . „Ni ĉiuj aŭ mortos, aŭ liberigos Bulgarian“ — skribas la revoluciulo Nikola Obretenov al sia patrino, la legenda Avino Tonka.

Kaj ili ĉiuj, ĵetas sin en la batalon. Kun kanonoj el ĉeriztrunkoj kontraŭ la kanonojn fabrikitaĵoj de Krupp. . .

Sen la Aprila Ribelo nia historio ne havus tiun „frenezan“ kaj subliman popolan levigon. En tiu sanga aprilo la bulgara tero preparis sin por la malavareco de la somero, sed trafis en la ĉirkaŭprenon de la incendioj. La ribelo estis majesta faro de bravegaj homoj, kiuj unuaj ekflirtigis la batalstandardojn. Ĉar laŭ la vortoj de Zahari Stojanov, kronikisto de la ribelo, „la grandegaj aferoj en la historio estas faro antaŭ ĉio de inspiritaj koroj kaj ne de saĝaj kapoj“.

Ni rememoru la poemon „Koĉo“ de Ivan Vazov, la epizodon kiam la vundita ribelulo

Koĉo, vidante ke la turkoj jam ĉirkaŭas la templon, en kiu lia familio kaj multaj aliaj trovis azilon, vokas sian edzinon — junan belulinon kun bebo surbruste, kaj ekkrias: „Kara, jen la hekatomb’/kaj. . . la malhonor — pli fia ol la tomb’ . . ./Morti ĉu vi volas?/Kaj edzino lia, /pala, mutiĝinta kaj rezignacia,/ bebon metas teren dum tumult’ batala,/ klinas sin kaj kisas la frunteton palan, /levas sin kaj diras: /„Estu ĝi post mi! Frapu!“ . . . Poste Koĉo ekkrias: „Por honesta mort’ /kaj por lasta frap’/ ankoraŭ restas fort’!“ Kaj li enpikas la sangon ponardon en sian koron. . .

Tian kuragon kaj moralan superecon la ribeluloj montras ne nur dum la batalo, sed ankaŭ post kiam la ribelo estas sufokita. Ni rememoru pri unu el la gvidantoj de la ribelo, pri Georgi Benkovski, kiu, rigardante la bruligitajn vilaĝojn, eldiras la profetajn vortojn: „Mi jam atingis mian celon! En la koron de la tirano mi faris vundon, kiu neniam resaniĝos. . .“

La Aprila Ribelo skuis la fundamentojn de la Otomana Imperio, malkaŝis antaŭ la tuta mondo la kruelecon de la regantoj, montris la decidemon de la bulgara popolo liberiĝi el la sklaveco. Potenco ondo de protestoj inundis tutan Eŭropon. En defendo de la bulgara justa afero levigis sciencistoj, verkistoj, sociagantoj, publicistoj, eminentuloj kiel Tolstoj, Dostojevskij, Viktor Hugo, Giuseppe Garibaldi, Darwin, McGahan. . . En multaj eŭropaj landoj la publika opinio kategorie subtenis la bulgarojn, kaj en Rusio kreigis tutpopola movado por liberigo de la frata bulgara popolo. Post la rifuzo de la Otomana registaro doni al Bulgario aŭtonomion, laŭ decido de l’Konferenco de la Grandpotencoj, okazinta en 1976 en Konstantinoplo, en aprilo 1877 Rusio deklaris militon al Turkio.

Post la Aprila Ribelo la Otomana Imperio kun maltrankvilo atendis la horon de la baldaŭa venĝo. Ĉar la masakritaj ribeluloj ne estis mortaj. Okazis tio, pro kio ĉiu tirano terurigas: la mortigitoj farigis legendo kaj espero por la vivantoj! . . .

Premita sub la boto de la baŝibozukoj, mortpafita kaj enkatengita, kun sangaj larmoj en la okuloj, nia popolo tamen eliris venkinto el tiu ĉi kruela batalo. Kaj de tie venas ĝia memsento.

Sen tiuj gloraj tagoj de fiera batalo nia historio estus multfoje pli malriĉa, niaj kantoj — pli tristaj, kaj la vorto „bulgaro“ ne sonus tiel fiere.

La bulgara aprilo 1876!

Aprilo, en kiu reviviĝis ne dio, sed la popolo, la simpla popolo vere reviviĝis!

Venelin MITEV



PRI LA STATO DE NIA ASOCIO

En 1985, laŭ komisiono de la Centra Estraro de Bulgara Esperantista Asocio, sciencista skipo el la Buroo por Em-pirijaj Esploroj ĉe Bulgara Sociologia Asocio, sub la gvidado de prof. Elit Nikolov, faris detalan sociologian es-ploron pri temo „La bulgaraj esperantistoj kaj iliaj korespondkontaktoj“. Estis enketitaj 1567 asociaj membroj el 85 societoj en la ĉefurbo kaj en la lando — t. e. pli ol 16% el la tuta membraro de BEA.

Ĉefceloj de la menciita esploro estis: 1) soci-demografia karakterizaĵo de la asocia membraro; 2) analizo de la korespondkontaktoj de la esperantistoj enlande kaj eksterlande; 3) analizo de la asocia agado.

La sociologia esploro estis efektivigita per enketkartoj. Konsultatoj de la esplorista skipo estis la heroo de socia-lisma laboro Nikola Aleksiev kaj docento Cano Ignev, kandidato de la filozofiaj sciencoj.

Por informi la membrojn de CE de BEA pri la rezultoj de la sociologia esploro kaj por pridiskuti la pliajn paŝojn al plibonigo de la asocia agado, la 1-an de marto j. k. en Sofio okazis Plenkunsido de la Centra Estraro.

Ĉefraporton pri la rezultoj de la sociologia esploro faris docento Cano Ignev. Post vigla pridiskutado, kiun parto-prenis reprezentantoj de la distriktaj estraroj de BEA, la Plenkunsido akceptis rezolucion pri la aktivigo kaj plibo-nigo de la korespondado de la bulgaraj esperantistoj kaj pri la estonta agado de Bulgara Esperantista Asocio.

Post la finiĝo de la enketo estis preparita analiza raporto, pridiskutita kaj aprobita de eksperta konsilio. En la tri bazaj partoj de la raporto estas farita serioza analizo de la donitaĵoj. Ĝi krome estas farita provo malkovri la pozitivajn kaj malfortajn flankojn de la socia agado kaj estas proponataj celkonformaj rekomendaj konsiloj por ties plibonigo.

Ĉi-sube ni publikigas fragmentojn el la raporto de Cano Ignev kaj el la Rezolucio de CE de BEA.

PARTO UNUA de la raporto analizas la soci-demo-grafian karakteron de la membraro de BEA. Jen kelkaj bazaj faktoj:

La meza aĝo de la enketitaj esperantistoj estas 39 jaroj, do evidentiĝas, ke BEA estas la plej juna (laŭ la aĝo de sia membraro) soci-kultura organizaĵo en nia lando. Pli ol 51% el la enketitaj personoj membras en BEA jam 10 jarojn, la veteranoj prezentas 19% el la tuta membraro, do tiu kiuas esperantisto membras en la Asocio pli ol 20 jarojn. La plimulto el la membroj — pli ol 13% — eniris la vicojn de BEA dum la periodo 1975—1980. Dum la lastaj jaroj plimultiĝis la esperan-tistinoj, kiuj superas la nombron de viroj per 11%. 21% el la membroj havas elementan klerecon (inkluzive ge-lernantojn ankoraŭ ne finintajn la mezlernejon); proksimume 40% havas duon-superan kaj superan klerecon kaj la ĉefa parto de la membraro havas mezan klerecon.

Laŭ sia socia stato la membroj de BEA dividiĝas jene-laboristoj — 13%, agraranoj — nur 1,28%, intelektuloj — 10%. Proksimume unu kvarono de la membroj de BEA estas engaĝitaj en la sfero de produktado kaj la ceteraj — en la sfero de scienco, klerigo kaj prservado. Al tiuj lastaj apartenas ankaŭ la grupo de lernantoj kaj pensiuloj. Pli ol 94% el la BEA-membroj loĝas en urboj kaj nur 6% — en vilaĝoj.

Ni kun ĝojo konstatas, ke la nombro de nia membraro ege plimultiĝis: antaŭ deko da jaroj BEA havis 6000 regulajn membrojn, kaj nun ilia nombro estas pli ol 9300. Tio estas atesto pri la kreskinta influo kaj aŭtorita-to de la Internacia Lingvo inter laboruloj kaj precipe inter la junularo. La junigo de la asocio (unu triono el la membroj estas ĝis 30-jaraĝaj) same estas rezulto de la enkonduko de fakultativa lernado de Esperanto en la mezlernejoj — 17,42% el la gelernantoj estas asociaj membroj, kio estas senprecedenca en nia E-movado post la socialisma revolucio 1944! Kuragiĝa estas ankaŭ la fakto, ke 24% el la membroj de BEA havas superan klercon, kio garantias tre favorajn kondiĉojn

por instruado kaj propagandado de Esperanto flanke de atkleraĵ personoj. Solida kerno de BEA estas la esperantistoj-veteranoj, multaj el kiuj lernis Esperanton en la faŝistaj malliberejoj kaj koncentrejoj, en la partizana-j taĉmentoj kaj post la venko super la faŝismo multe kontribuis por restarigo de la E-societoj kaj por popula-rigo de la Internacia Lingvo en nia lando.

La enketo montris ankaŭ iujn gravajn malperfekta-ĵojn en la sociala direkto de nia agado. Estis konstati-te, ke nur 13% el la tuta membraro de BEA estas la-boristoj. Kvankam ne tre ekzakta, tiu ĉi procento estas nekontentiga kaj atestas pri nesufiĉe aktiva varbado de novaj esperantistoj el la laborista medio. BEA havas multjarajn tradiciojn tiurilate jam en la periodo de BuLEA (Bulgara Laborista Esperantista Asocio), en kies vicoj aktivadis multaj eminentaj agantoj de nia E-movado. Nia devo estas starigi pli intimajn kontaktojn kun la Centra Konsilantaro de Bulgaraj Profesiaj Unui-ĝoj (BPS) por organizi en fabrikoj, uzinoj, laborejoj kursojn de Esperanto por laboristoj, plivigligi nian por-esperantan propagandan laboron en laborista medio, pli intime kunlabori kun la Domoj de Kulturo de la Sindikatoj. Ni devas pli vaste diskonigi la sperton de la esperantistoj el la panfabriko en Gabrovo, prepari alt-nivelajn lernilojn speciale por laboristoj.

Plej nekontentiga estas la situacio en niaj vilaĝoj kaj agrarindustriaj kompleksoj (AIK) en kiuj la procento de la membroj de BEA estas apenaŭ 1,2. La kampa-ranoj estas granda rezervo por nia E-movado kaj ni de-vas direkti niajn penojn al organizado de kursoj kaj so-cietoj en vilaĝoj kaj en AIK, ĉar al kamparanoj Espe-ranto povus esti tre utila en ilia praktika laboro. Ĉe la distriktaj estraroj de BEA devas labori specialaj orga-nizantoj, kiuj zorgu pri disvastigo de la Internacia Lingvo inter kamparanoj. Tiucele oni devas popularigi kaj vaste enkonduki la sperton de la esperantistoj el Haskovo, kie agadas veturantaj lektoroj, kiuj helpas la instruadon de Esperanto en la vilaĝoj de la distrikto.

Nepre necese estas, ke la societaj estraroj starigu pli intimajn kontaktojn kun la vilaĝaj legosocietoj, zorgu pri popularigo de Esperanto, pri organizo de E-kursoj ĉe la legosocietoj. Por efektive de tiuj taskoj multe povus kontribui la eldonata en nia lando „Agrara Bulteno“. Estas necese tamen plibonigi ĝian redaktadon, enhavon, disvastigadon eksterlande kaj per kolektado kaj publikigo de adresoj de esperantistoj-agraranoj helpi por pli vigla internacia korespondado pri agraraj problemoj.

Alia grava problemoj estas la senĉesa perfektigado de nia lingvoscio. La enketo montras, ke 1/3 el la membraro estas esperantistoj nur de 3 jaroj kaj krome — 2/3 el la membroj de BEA ne kontentige posedas Esperanton, malofte uzas ĝin por korespondado kaj por aliaj kontaktoj. Tio estas serioza problemoj. BEA estas kultur-kleriga organizo, kies agado baziĝas precipe sur la regado de la Internacia Lingvo kaj tio devigas ĉiujn membrojn de la asocio (konforme al la Statuto) ekposedi Esperanton kiel eble plej bone.

La enketo atentigas pri ĝojiga fakto — plimultigo de la ĝejunuloj kaj ĝelernantoj en la vicoj de BEA. Tio estas serioza pluso en la nuna stato de nia movado, sed la grava problemoj estas altni al la asocio pli grandan nombron el tiuj junuloj, kiuj finas diversgradajn kursojn de Esperanto, prepari ilin kiel aktivajn agantojn de BEA en ilia medio. Ne malpli grava estas la problemoj pri ilia idea-politika edukado, pri ilia altiro al diversaj arangoj: konkursoj, recitaloj, renkontigoj ktp. Tio ja postulas starigon de pli intimaj kaj rezultodonaj kontaktoj kun la Komsomolo, organizon de komunaj iniciatoj.

Proksimume 15% el la enketitoj havas duonsuperan klercon — tio estas precipe instruistoj ĵinintaj duonsuperajn pedagogiajn institutojn. Tia koncentrigo de instruistoj en nia movado estas favora bazo por preparo de kursgvidantoj, necesaj por la solvo de tiel grava problemoj — instruado de Esperanto en la lernejoj kaj rezulte — pli altigo de la nivelo de lingvoscio. Por kontentigi la interesojn de nia asocia inteligentularo ni devas organizi importadon de pli granda kvanto da ĵurnaloj, revuoj, libroj kaj aliaj esperantaj eldonaĵoj surbaze de interŝanĝo, ja ni lastatempe efektivegas vigan eldonagadon, aperis multaj interesaj eldonoj — originalaj kaj tradukitaj. Gravan rolon por akiri kaj interŝanĝo de sciencaj konoj ludas la organizata en Veliko Tŕrnovo Internacia Somera Esperanto-Universitato, diversaj simpozioj, scienc-praktikaj konferencoj kun internacia partopreno, k. a.

Alia serioza problemoj estas la certigo de materiala bazo — konstruado de esperantaj domoj, kluboj, kursejoj, ktp., estetikaj arangitaĵoj kun ĉiuj necesaj kondiĉoj kaj lerniloj por moderna instruado. Tio ankaŭ pligrandigos la aŭtoritaton de la E-movado, de BEA, kreas favoran publikan opinionon.

Gravan rolon por varbado de novaj adeptoj de la Internacia Lingvo inter laboristoj kaj kamparanoj, junuloj kaj lernantoj sendube ludas la vasta informado kaj propagando, la alloga amasa kultur-kleriga agado. Ni devas pli celkonforme utiligi la amaskomunikilojn, havigante al ili kompetentajn, majstre verkitajn artikolojn kaj informojn pri kaj por Esperanto, pri okazontaj naciaj kaj internaciaj esperantaj arangoj, pri sukcesoj de esperantistoj en diversaj kampoj de la scienco, kulturo, arto, sporto, ktp. De nia iniciatemo kaj vigla kunlaborado dependas la pli ofta aperigo de diversaj poresperantaj materialoj sur la paĝoj de nia gazetaro, en la radio kaj televido. La problemoj pri elsendado de Esperanto-kurso per la televido estas ege grava kaj nepre solvenda! Regulaj radiodisaŭdigoj same estas ege bezonataj kaj realiginda! Tiuj estas la plej gravaj problemoj de nia asocio.

En la DUA PARTO de la sociologia esploro estas pensigaj momentoj pri aplikado de Esperanto en la ĉiutaga vivo. Laŭ la enketo, 40% el la membraro de BEA praktikas Esperanton, legante E-librojn kaj periodaĵojn; 28% uzas la lingvon por personaj kontaktoj kaj interparoloj kun samlandaj kaj fremdlandaj esperantistoj; 24% praktikas Esperanton pere de korespondado. Tio montras relative altan aktivecon de niaj membroj en la praktika aplikado de Esperanto. La plimulto el la en-

ketitoj korespondas kun esperantistoj el Sovetunio kaj el la socialismaj landoj — 43,25%, 39% — kun esperantistoj el kapitalismaj landoj, kaj ĉirkaŭ 40% — kun korespondantoj el la lando. La korespondado celas ĉefe pliriĉigon de siaj konoj pri la mondarto, pri vivmaniero kaj historio de diversaj landoj, perfektigon en la lingvo. Tamen la maniero de aplikado kaj praktikado de Esperanto ĉiam ankoraŭ ne estas sufiĉaj, variaj kaj sistemaj. Estas necese, ke en la societoj oni fondu bibliotekojn, kiujn konstante pliriĉigu per novaj diversnaciaj eldonaĵoj. Ĉiam ankoraŭ dum renkontigoj, kunsidoj, kongresoj ktp. oni ne parolas nur en Esperanto kiel oni faris tion dum la 41-a kongreso de BEA en tiu estas la ĝusta vojo al perfektigo de la lingvo.

La korespondado kun alilandaj esperantistoj ĉiam ankoraŭ ne estas sufiĉa (nur 10% el la membroj de BEA havas aktivaajn korespond-kontaktojn) kaj traktas plej ofte intimajn, konkretajn temojn. La korespondado kun eksterlandanoj devas esti siaspeca informado de niaj alilandaj leteramikoj pri nia patrujo, pri niaj atingoj en ĉiuj sferoj de la socia vivo, pri la konstruado de la socialisma socio en nia lando. La problemoj pri konservado de la paco, de la naturmedio, pri profesia sperto devas trovi indan lokon en nia korespondado kaj la societaj estraroj devas helpi kaj instigi la korespondadon kun eksterlandaj esperantistoj. Bonan kaj imitindan sperton tiurilate havas la distriktaj estraroj de BEA en Stara Zagora, Gabrovo, Sumen. Publikigo de adresoj en niaj E-periodaĵoj estas grava tasko de ties redakciaĵoj. En kursoj kaj seminarioj oni nepre starigu tiun problemon kaj ĉe efektive kolektivon korespondadon. Dum lecionoj de Esperanto la kursgvidantoj devas dediĉi certan tempon por doni ekzemplojn pri korespondado (ĉe pri la formo de la leteroj) al la gekursanoj, instigi ilin al regula korespondado. Ĉiu devas trovi la plej interesajn kaj praktikajn temojn de sia korespondado. Por tio jam ekzistas solida bazo en nia asocio.

La TRIA PARTO de analizo de la enketo traktas la opiniojn, pritaksajn kaj proponojn de la membroj de BEA lige kun la laboro kaj la agado de la Centra Estraro de Bulgara Esperantista Asocio kaj de ĝiaj fakoj kaj sekcioj en la tuta asocia reto.

La enketitoj ĝenerale pritaksas la agadon de la gvidantoj de BEA kiel pozitivan kaj rezultodonan — precipe iliajn senperajn vastajn kontaktojn kun la distriktaj kaj societaj estraroj. Bone estas, ke jam ekzistas dokumentoj kaj instrukcioj por la laboro de la asociaj gvidorganoj surbaze de la principoj de demokratia centralismo. Tamen en la enketo oni starigas postulojn pri pli efektiva organiza kontrolo, ĉar multaj E-societoj ekzistas kvazaŭ nur surpapere, formale, ne havas regulan organizan vivon. Oni substrekas la neceson pri pli vigla kaj celkonforma propaganda laboro pere de la amaskomunikiloj en la tuta lando, starigon de regulaj kontaktoj kun kulturaj kaj sociopolitikaj institucioj en la lando — precipe kun la Sindikatoj, Patrolanda Fronto, Komsomolo, lokaj konsilantaroj de kulturo, ktp. Per ilia helpo oni povus efektive rezultodonan poresperantan inform-propagandan laboron inter la loĝantaro. Specialan atenton oni devas turni al la instrulaboro de BEA, kiel elirpunto al ĉiufanara plibonigo de la asocia agado.

La efektivegita enketo, kvankam ne tute perfekta, donis sufiĉe klaran bildon pri la stato kaj agado de Bulgara Esperantista Asocio kaj ĝiaj sekcioj tutlande, montris multajn pozitivajn flankojn kaj gravajn malperfektaĵojn de nia laboro. Fakte ĝi estis ampleksa kaj tio eble ne permesis pli detalan pristudon de diversaj flankoj de nia agado.

Dum sia jam 80-jara ekzistado la bulgara esperantista movado havas glorajn tradiciojn, kiujn ni devas apliki en nian nuntempan ĉiutagan agadon, atentante ankaŭ pri la rezultoj kaj rekomendoj de la enketo.

Ek al laboro por plua evoluigo de la atingitaj rezultoj!

(El la raporto de CANO IGNEV antaŭ la Plenkunsido de CE de BEA, kazinta la 1-an de marto, 1986, un mallongigoj)

Rezolucio

DE LA PLENKUNSIDO DE CE DE BEA, OKAZINTA LA 1-an DE MARTO 1986

(Fragmentoj)

La Plenkunsido opinias, ke plej grava tasko de la bulgaraj esperantistoj estas ilia aktiva partopreno en la laboro por plenumo de la unueca plano por soci-ekonomia evoluo de Popola Respubliko Bulgario dum 1986 (la unua jaro de la Naŭa jarkvino), aprobita fare de la XIII kongreso de BKP.

La Plenkunsido pozitive pritaksas la praktikan laboron de la Buroo de CE de BEA, efektivigata konforme al la decidoj de la 41-a kongreso de la asocio.

Surbaze de la konkludoj de la realigita sociologia esploro pri la agado de BEA, la Plenkunsido decidas:

PRI LA INSTRULABORO

— Ĉefa tasko de la Centra Estraro kaj de la distriktaj estraroj de BEA estas kolektiva kaj individua metodika helpo al instruantoj, organizo de seminarioj kaj kursoj por plialtigo de la kvalifiko de la kursgvidantoj. CE de BEA, la Instruista Sekcio kaj la distriktaj estraroj organizu metodikajn komisionojn, kies ĉefa tasko estos helpi la instruistojn kaj la instrulaboron surloke.

— La distriktaj estraroj certigu konvenajn ejojn (agrabla kaj estetike aranĝitajn) por la E-kursoj kaj fiksu plej taŭgajn horojn por kurslaboro.

— Per la helpo de la sociaj organizaĵoj DE de BEA organizu kursojn en fabrikoj, uzinoj, laborejoj kaj kulturdomoj, certigante spertajn kursgvidantojn.

— La Internacia E-kursejo (IEK), per la helpo de DE de BEA, organizu vastan reton de forestaj E-kursoj kaj malaltigu la taksojn por partopreno en ili. Parton de la elspezoj prenu sur sin IEK kaj la distriktaj estraroj. IEK garantiu 10%-an rabaton por ĉiuj organizitaj membroj de BEA).

— Speciala komisiono zorgu pri aplikado de pli modernaj instrumentoj. Por la celo ĝi pristudu la pozitivan sperton ĉe ni kaj en alilando kaj ellaboru konkretajn proponojn.

— CE de BEA rekomendas aljuĝadon de moralaj kaj materialaj premioj por la plejbonuloj en ellernado de la lingvo. Estu organizitaj interŝanĝo de E-grupoj kun aliaj landoj, laborbrigadoj kun partopreno de fremdlandaj esperantistoj k. a.

— CE de BEA garantiu la eldonadon de la necesaj lerniloj por diversgradaj kursoj kaj aĝgrupoj. Plenvolara aplikado de komputera tekniko estas nepre necesa.

— La asocia informbulteno publikigu informojn por interŝanĝo de sperto kaj klarigu malfacilajn momentojn en la lingvoinstruado.

— CE de BEA ne rezignu pri la ideo organizi E-kurson en la Televido.

PRI LA INTERNACIA KORESPONDADO

— La aktiva internacia korespondado estas grava devo de la bulgaraj esperantistoj. Ili devas rakontadi al siaj leteramikoj (precipe al tiuj en kapitalismaj landoj) la veron pri la reala socialismo, pri la socialaj akiraĵoj de la bulgaraj laboruloj, pri la socialisma vivmaniero, pri la aktiva pacbatalo de la bulgara popolo.

— Pli vasta korespondado kaj regula sendado de bulgaraj E-revuoj, broŝuroj k. a. al la leteramikoj en alilando estas rekomendindaj.

— La revuoj „Bulgara Esperantisto“, „Paco“, „Internacia Jurnalisto“ k. a. E-eldonoj publikigu regule adresojn de dezirantoj korespondi.

— Renkontiĝoj de aktivaj korespondantoj por interŝanĝo de sperto estas tre necesaj. Oni invitu al tiuj renkontiĝoj ankaŭ fremdlandajn korespondantojn. Honoraj diplomoj kaj monpremioj al la korespondantoj-elstaruloj estu disdonataj.

— Specialaj komisionoj por subteno de la internacia korespondado estas organizotaj.

PRI LA PROPAGANDO DE ESPERANTO

— CE de BEA devas regule havigi al la redakcioj en la tuta lando informmaterialojn pri la internacia E-agado kaj pri gravaj eventoj kaj aranĝoj de BEA.

— Tre grave estas starigi senperajn kontaktojn kun jurnalistoj el ĉiuj amaskomunikiloj, kiuj emas speguli E-aranĝojn kaj regule provizi ilin per interesaj materialoj el la vivo de la societoj.

— La respondeculoj pri propagando ĉe CE de BEA regule havigu al eksterlandaj E-redakcioj kaj radio-televidaj elsendstacioj — en Varsovio, Budapeŝto k. a., informojn pri la agado de BEA.

— La distriktaj estraroj de BEA aranĝu vitrinojn el interesaj leteroj kaj ilustritaj poŝtkartoj, prezentantaj faktojn el la vivo kaj agado de BEA kaj de la internacia E-movado.

— Lige kun la 100-jara jubileo de Esperanto BEA eldonu diversajn propagandajn materialojn: mallongajn filmojn, diapozitivajn, afiŝojn k. a.

PRI VARBADO DE NOVAJ MEMBROJ KAJ PLIBONIGO DE LA ORGANIZA LABORO

— DE de BEA insiste klopodu ĉe gvidinstancoj en uzinoj, fabrikoj, laborejoj pri organizo de E-kursoj, klarigu la utilon de Espe-

ranto por laboristoj.

— DE de BEA informu pri Esperanto kaj propagandu ĝin en vilaĝoj individue kaj organizite (vizitado de vilaĝoj kaj agrarindustriaj kompleksoj fare de artaj grupoj), organizu E-kursojn kaj E-societojn en vilaĝoj.

— DE de BEA kaj la societaj estraroj varbu kaj envicigu en BEA novajn membrojn el la personoj sukcese finintaj kursojn de Esperanto. La Instruista Sekcio ĉe BEA kaj la distriktaj estraroj turnu seriozan atenton al lernejanaj medioj kaj organizu E-klubojn en lernejoj.

— La E-societoj laŭ profesiaj interesoj plialtigu la lingvan nivelon de siaj membroj kaj plivigligu ilian internacian korespondadon.

— CE kaj DE de BEA organizu komunajn aranĝojn kun publikaj organizaĵoj (Patrolanda

Fronto, Komsomolo, Turista Unuiĝo, Sindikatoj, ktp.), orĝnizu ĉiam pli interesajn aranĝojn por variigo de la agado de E-societoj.

— La Organiza Komisiono ĉe CE de BEA sendu sisteme en la distriktojn kompleksajn brigadojn, kiuj helpu surloke la agadon de DE kaj de la E-societoj.

— Seminarioj kaj simpozioj kun gvidorganoj de BEA estas rekomendindaj por plibonigo de ilia laboro.

La Plenkunsido de Bulgara Esperantista Asocio alvokas ĉiujn bulgarajn esperantistojn bone ellerni kaj apliki la decidojn de la Februara Plenkunsido de CK de BKP, kaj ankoraŭ pli impete labori por serioza plibonigo de la asocia agado kaj por inda plenumo de la decidoj de la XIII kongreso de Bulgara Komunista Partio.

SOFIA E-DOMO DE KULTURO „M. GORKIJ“

La Sofia Esperanto-Domo de Kulturo „M. Gorkij“ (SEDK) ĉe la Urba Estraro de BEA havas nelongan historion — pasis nur kvin jaroj ekde ĝia fondo. La agado de SEDK estas daŭrigo de la agado de la ekzistanta ĝis 1981 E-societo „M. Gorkij“ en Sofio — unu el la malnovaj societoj en la E-movado ĝenerale, kun siaj tradicioj, dank' al kiu en Bulgario elkreskis plejdaŭ elstaraj esperantistoj — kontribuintaj al disvolvo de la bulgara kaj internacia E-movado. La deziro pri pli bone organizita vivo de la multnombraj sofiaj esperantistoj kondukis al dispartigo de la societo je 21 subdistriktaj E-societoj. Laŭ iniciato de la kandidato de filozofiaj sciencoj docento Cano Ignev, estis fondita Esperantista Kulturcentro „Maksim Gorkij“ — tre populara en la lando kaj ekster ĝi. Ekde tiam, dum tri jaroj, oni konstante serĉas la plej konvenajn formojn por sukcesa plenumo de la taskoj starantaj antaŭ la E-organizaĵo. Kaj en februaro 1984, per decido de la Plenkunsido de UE de BEA — Sofio, la Esperantista Kulturcentro „M. Gorkij“ transformiĝis en Sofian Esperanto-Domon de Kulturo „M. Gorkij“.

La ĉefa tasko de SEDK estas organizi kaj gvidi la kompletan kulturan, propagandan kaj edukan laboron de la Sofia Urba E-organizaĵo. Tion ĝi efektivas pere de diversaj agadformoj. Plej grava aranĝo de SEDK estas la Tagoj de E-Kulturo, organizataj ĉiun duan jaron. Konferencoj pri kulturaj temoj, teatraĵoj prezentitaj de BET, kreaĵrenkontiĝoj de verkistoj kaj artistoj, solenaj koncertoj dum la tagoj pravas la evoluon de la Esperanta kulturo. Ĝi-jare la Tagoj de la E-kulturo okazos de la 11-a ĝis la 13-a de decembro kaj estos dediĉitaj al la paco.

SEDK organizas siajn regulajn ĉiusemajnajn aranĝojn, kiuj helpas la praktikan aplikadon

de Esperanto, respegulas signifajn enlandajn kaj internaciajn eventojn. Estas celebrataj veteranoj-esperantistoj, kunlabore kun la kulturaj centroj de la socialismaj landoj en Sofio estas organizataj solenaĵoj lige kun gravaj datrevenoj. Sian lokon trovis ankaŭ la konstantaj rubrikaj „Vespero de filologo“ — pri lingvaj temoj, „Medicinista vespero“ — pri t. n. oftaj malsanoj, „Junularaj renkontiĝoj“ — por esperantistoj kaj neesperantistoj, „Gaste al SEDK“ — temas pri gastado de E-societoj kaj distriktaj estraroj de BEA, „Impresoj pri la internacia E-vivo“ k. a., kiuj provokas grandegan intereson kaj, sekve, interparolojn, kontribuantaj al perfektigo en la lingvo. La aranĝojn konigas al la sofiaj esperantistoj trimonataj programoj bulgarlingve kaj Esperante.

Grava momento en la SEDK-agado estas kunlaboro kun diversaj organizaĵoj. Pere de komunaj aranĝoj kun kulturcentroj de socialismaj landoj en Sofio kaj iuj enlandaj amasorganizaĵoj SEDK strebas popularigi sian agadon kaj plejparte la internacian lingvon Esperanto. Siajn atingojn SEDK konigas al eksterlandaj esperantistoj dank' al kunlaboro kun E-kulturcentroj en alilandoj.

Tiun ĉi vastan kaj tre utilan laboron la Domo efektivas per grupoj diversspecaj — lektora grupo, kluboj „Juna Esperantisto“ kaj „Verdaj Steletoj“, klubo de veteranoj-esperantistoj, profesia kantgrupo „Orbita“, grupo de amatora arto. Al tiu laboro kontribuas ankaŭ Bulgara Esperanto-teatro, la Ĥoro de Sofiaj Esperantistoj kaj la Sofia Literatura Rondo.

Sendube la agado de SEDK estas kontribuo al plialtigo de la aŭtoritato de la Sofia Urba E-organizaĵo. SEDK daŭre laboros por sukcesa plenumo de siaj taskoj.

Nedka VALJAVIČARSKA,
direktoro de SEDK „M. Gorkij“

NEFORGESEBLA REMEMORO

En mia urbo Varna estas kelkaj Esperanto-societoj, el kiuj la plej malnova estas „Albatroso“, fondita en 1904. Ĝi havas propran klubojn en la urbocentro kaj sian „Oran Libron“ — valorajo, kiu spegulas momentojn el la esperantista vivo en nia lando. Ĝi konservas impresojn, dankesprimojn, bondezirojn kaj kritikajn notojn de niaj karaj gastoj, vizitintaj Varna'n kaj nian klubojn.

Sur unu el la paĝoj de la „Ora Libro“ ni trovas modestan skribaĵon: „Al karaj, gastamaj Varnaj samideanoj

Varna, 28. VIII. 1936

Dr Mieczyslaw Zamenho
Warszawa, Senatorska 36“

Permesu al mi, kara leganto, rakonti al vi pri ĉi tiu neordinara gasto.

Estis varmega aŭgusta tago de la jaro 1936. Mi ĵus estis vizitinta nian familian kuraciston por paroli kun li pri la sanstato de mia frateto Totko, kiu estis grave malsana. La kuracisto d-ro Nikola Dimitrov tute klare diris al mi, ke li faris ĉion eblan, sed vane. . . la malĝoja fino estas neevitebla. Tute malesperigita de tiuj vortoj, mi eniris la klubojn de nia societo „Albatroso“. En la kluboj mi eksciis, ke antaŭ kelkaj minutoj niaj klubanoj hazarde renkontis nian eksterlandan esperantiston kaj kune kun li iris al la plaĝo. Ankaŭ mi direktiĝis al la marbordo. La plaĝo estis plenplena de homoj. Sur la difinita loko, kie ni esperantistoj ordinare kolektiĝis, mi vidis verdan flageton sur la sablo kaj nekonatan viron, ĉirkaŭitan de niaj gesamideanoj, kiuj gaje babilis. Mi alproksimiĝis. Oni prezentis min al nia gasto — la pola kuracisto d-ro Mjeĉislav Zamenhof — nevo de nia kara Majstro. Mi ekdis apud li. Iu rakontis gajan historion, kaj ĉiuj laŭte ridis. D-ro M. Zamenhof baldaŭ konstatis, ke mi ne partoprenas en la ridado kaj subite sin turnis al mi:

— Kial vi estas malgaja?

Mi diris, ke mia frateto estas grave malsana kaj ke la lasta interparolo kun nia familia kuracisto senigis min je ĉiu espero. d-ro M. Zamenhof estiĝis serioza. Li ekstaris kaj diris:

— Ĉu mi povas vidi la infanon? Mi estas infankuracisto.

Ni vestis nin kaj tuj ekiris kune al mia domo.

Mia frateto kuŝis en la lito preskaŭ senviva. D-ro M. Zamenhof atente esploris la mortontan knabon kaj diris al mi:

— Mi penos savi lin, sed, ĉar mi estas alilandano, mi ne rajtas preskribi recepton ĉi tie. Bonvolu inviti vian familian kuraciston. Mi devas paroli kun li.

Mi tuj iris kaj petis d-ron N. Dimitrov veni en nian domon. Ambaŭ kuracistoj longe interparolis. Fine d-ro N. Dimitrov konsentis

subskribi la recepton, kiun diktis al li d-ro M. Zamenhof. Mi prenis la recepton kaj ekkuris al la apoteko . . .

Ĉiutage, ĝis la lasta tago de sia restado en Varna, d-ro M. Zamenhof vizitadis la malsanan infanon. Okazis miraklo . . . Iom post iom la vivo revenis al mia frateto. Li estis savita.

Post sia reveno en Pollandon d-ro M. Zamenhof ne forgesis nin. Li skribis al ni leterojn, interesiĝis pri la sanstato de mia frateto, donadis konsilojn. . . La Dua Mondmilito interrompis nian korespondadon kaj mi plu nenion eksciis pri nia savinto. Totko finis gimnazion, studis medicinon kaj nun li mem estas kuracisto — oto-rino-laringologo.

Kiam en 1959 mi prepariĝis veturi al la 44-a Jubilea Universala Kongreso de Esperanto, mia frato venis al mi kaj diris:

— Mi petas vin, frato mia, estante en Varsovio, bonvolu nepre serĉi mian savinton d-ron M. Zamenhof.

En Varsovio mi demandis multajn esperantistojn pri d-ro M. Zamenhof, sed bedaŭrinde neniu sciis ion ajn pri li.

Dum la kongresaj tagoj mi hazarde renkontis mian malnovan korespondanton Józef Konderak, kiu nun loĝis en Lublin. Li insiste petis min gastigi al li. Ĉu mi povus rifuzi al homo, kun kiu mi korespondadis depost 1922? Proksime de Lublin troviĝas la faŝista koncentrejo „Majdanek“, en kiu pereis miloj da senkulpaj homoj. Iun tagon, akompanate de ĵurnalisto-esperantisto, mi vizitis tiun lokon de la morto. . . Mi ne kapablas priskribi trankvile tion, kion mi vidis — la gaskamerojn, la loĝejojn, la kremacian fornejon. Tie ankaŭ oni povis vidi dikegan libron, en kiu estis registritaj la nomoj de la viktimoj — pli ol 300 000! Mi atente trafolumis ĝin, serĉante la nomon de d-ro M. Zamenhof. . .

Post mia reveno en nian landon, la unua demando de mia frato estis:

— Ĉu vi trovis d-ron M. Zamenhof?

— Bedaŭrinde, mi nenion povis ekscii pri li — estis mia respondo.

Pli poste, helpe de la Esperanta redakcio de Pola Radio mi eksciis, ke d-ro M. Zamenhof estis pereinta en 1945.

. . . Jam dum pluraj jaroj, gvidante kurson de Esperanto, ĉu en Bulgario, ĉu eksterlande, la unuan kanton, kiun mi instruas al miaj ge-kursanoj, estas la pola popolkanto „Knabineto arbaretan. . .“

Kaj tamen mi sentas, ke mi ĉiam estos ŝuldanto al la grandanima kuracisto d-ro M. Zamenhof kaj al Esperanto.

Doc. Georgi DIMOV



Iva nka Spasova kaj Zahari Ivanov dum Solenaĵo

LA TUTA SOFIA DISTRIKTO KONAS LIN...

Antaŭ nelonge la esperantistoj el la ĉefurbo Sofio kaj el la distrikto de Sofio celebris la 80-jariĝon de la aktiva batalanto kontraŭ faŝismo kaj kapitalismo, veterano de la E-movado kaj membro de la Buroo de DE de BEA, Sofio — Zahari Ivanov.

Li naskiĝis la 26-an de marto 1905 en vilaĝo Podgorie, regiono de Dolna Banja. Jam kiel lernanto li estis inspirita de la agado de la komunistoj Kiril Lazarov, Dimitar Milčev, Boris Haĝisotirov, Mihail Dašin k. a. Li mem aliĝis al la antifaŝisma batalo, partopreninte la lernejan strikon en Ihtiman. En 1924-1925 jaro Ivanov fariĝis membro de marksisma-leninisma rondo en la Pedagogia Gimnazio de urbo Samokov. El tiu rondo formiĝis komismola konspira ĉelo. Sed la polico arestis ties membrojn kaj Z. Ivanov estis ĵetita en la centran prizanon en Sofio. De post tiam li ekiris la malfacilan, sed gloran vojon de la Komunista Partio.

Dum la someraj ferioj de 1930 Zahari Ivanov komencis lerni Esperanton, konvinkita, ke ĝi helpas lian partian agadon. Paralele kun tio, li fordonis siajn entuziasmon kaj fortojn serve al la Sindikato de Instruistoj en la regiono de urbo Ihtiman.

Dum tiu plej malfacila por nia popolo periodo de la kontraŭ faŝisma batalo k-do Ivanov estis ĉiam je dispono de la Komunista Partio kiel organizanto de la rezista movado, de sabotado kaj strikoj. Li certigis konspirajn loĝejojn, nutraĵojn, monrimedojn al nelegalaj

funkciuloj de la partio. Pro siaj komunistaj ideoj kaj kiel partia organizanto li estis inter-nigita en v. Klisura — regiono de Berkovica. Sed, hardita batalanto, Z. Ivanov ne cedis antaŭ la malfacilaĵoj, plu aktivadis en la kontraŭfaŝisma batalo. Pro tio li estis pune translokigita en la koncentrejon Enikoj kaj pli poste — en vilaĝon Mogila, regiono de Novi Pazar, kie li restis ĝis la venko de la socialisma revolucio en 1944.

En la periodo 1928—1940 li estis membro de regiona partia komitato en Dolna Banja — Kostenec, laboris en la Sofia Distrikta Komitato de la Partio kaj aliloke. Li estis respondeca funkciulo en la ekonomia sektoro kaj en la ŝtata aparato.

Kiel esperantisto kaj komunisto Z. Ivanov fordonis sian tutan energion kaj sian liberan tempon por disvastigado de la internacia lingvo Esperanto kaj por ĝia aplikado en la pacbatalo. Estas bone konata la pozitiva rolo de k-do Ivanov en la MEM-sekcio (Mondpaca E-Movado). Konsiderinda kaj grava estas lia persona kontribuo al la organizado de la Someraj Internaciaj Kursoj por E-instruistoj en Meden Rudnik apud Burgas. Multaj partoprenintoj en tiuj kursoj nun estas aktivuloj-esperantistoj.

Kiel membro de la Buroo de Sofia Distrikta Estraro de BEA Z. Ivanov fondis kurson de Esperanto por instruistoj. Dum kelkaj jaroj DE de BEA sukcesis prepari multajn proprajn instrukadrulojn. Simila kurso funkcias ankaŭ nun. Tiamaniere la fakultativa instruado de Esperanto en Sofia distrikto okupis unu el la unuaj lokoj en la lando.

Zahari Ivanov estas dekorita per altaj ordenoj kaj distingoj. Lige kun lia 80-jariĝo la Stata Soveto de PR Bulgario distingis lin per la ordeno „Popola Respubliko Bulgario“ — I-a grado.

Ivan ĈULEV

EKZEMPLO DE SINDONEMO

Ivanka Gavrilova Spasova naskiĝis la 7-an de julio 1915 en urbo Etropole (distrikto de Sofio). Si devenas el progresema bulgara familio. Por partopreno en la batalo kontraŭ faŝismo kaj kapitalismo ŝiaj gepatroj estas internigitaj. Iliaj tri filinoj ankaŭ ekiras la vojon de la batalo.

Kiel lernantino Ivanka Spasova estas trifoje eksigata pro siaj progresemaj mondkonceptoj kaj devis daŭrigi la lernadon en diversaj urboj de la lando. La mezlernejo ŝi finas kiel

privata lernantino en Vidin. En 1935 ŝi estiĝas membro de BKP kaj de post tiu tempo estas funkciulino en la teknika aparato de CK de la Partio. En 1941 Ivanka Spasova finas slavan filologion en la Sofia Universitato. Dum disjetado de flugfolioj en kvartalo „Ivan Vazov“ ŝi estas arestita kaj kondamnita al 12-jara malliberigo. Ŝi restis en la malliberejoj en Sofio kaj Pleven ĝis la tago de la venko en 1944. Poste ŝi edziniĝas kun la profesia revoluciulo Spas Hristov.

Pri Esperanto Ivanka Spasova interesiĝas jam en la lernejo. La kapabla lernantino facile kaj plezure lernas la Internacian Lingvon. Ŝia unua instruisto — tiama sekretario de la junkomunista organizaĵo, donas al Ivanka la adreson de ŝia samaĝulino el Ĉeĥoslovakio. Samtempe ŝi aliĝas al la rondo de junuloj-esperantistoj: Hristo Gambazov, Anton Bozarov, Ivan Vasilev. Ŝi membras ankaŭ en mark-sista rondo.

Ekskluziva evento por la progresema junulino estas la renkontiĝo kun Trifon Hristovski. Tiu homo, suferanta je grava fizika krip-laĵo, per Esperanto interrilatis kun homoj el la tuta mondo kaj lia vivo estiĝas por Ivanka ekzemplo de sindonemo.

Jam studentino, Ivanka Spasova subtenas kontaktojn kun Nikola Aleksiev, Simeon Petrov, Asen Grigorov, Anĝelo, Pelin Velkov, Georgi Petrov, vizitas la E-klubon sur strato „Alabin“. Ankaŭ ŝia frato Gavril Gavrilov estas konata esperantisto en urbo Dupnica (nun Stanke Dimitrov).

Post la Naŭa de Septembro 1944 Ivanka Spasova kiel instruistino, konsilanto en la Ministra Konsilantaro, redaktoro en eldonejo „Partizdat“, daŭrigas okupiĝi pri Esperanto.

La amikeco de Ivanka Spasova kun Asen Grigorov estas interesa momento en ŝia vivo kaj daŭras ĝis lia morto. Bonega homo kaj talenta poeto, la fama esperantisto estis kora kaj helpema, vera amiko. Pri li ŝi ĉiam rememoras kun multe da estimo.

Per la Internacia Lingvo kreigas daŭra amikeco inter la familioj de Ivanka Spasova kaj la germana esperantisto-komunisto Otto Besler. Inter la korespondantoj de Ivanka Spasova estas ankaŭ la soveta poeto-esperantisto Petro Poliŝĉuk.

Nun Ivanka Spasova aktive laboras sur la socia kampo. Pere de ŝia korespondanto-esperantisto el Britio ŝi efektivigis kontaktojn inter virinoj el Bankja kaj tiuj el la kampadejo ĉe la militbazo Greenham Common. Ŝi estis prezidantino de la loka societo „Solidareco“ kaj gvidis E-kurson por infanoj, loĝantaj sur strato „Esperanto“ en Bankja.

Ivanka Spasova estas ekzemplo de sindonemo al la Internacia Lingvo kaj al la socialisma konstruado en nia lando.

Nevena KRÄSTEVA

RAJNA-PRINCINO



Rajna-Princino kun la ribelstandardo de Panagjuriŝte.

Ne estas bulgaro, kiu ne scias la nomon de Rajna-Princino — la brava junulino Rajna Popgeorgieva Futekova, kiu kudris kaj flirtigis la standardon de la Aprila Ribelo 1876 en Panagjuriŝte, kun la fajraj, ore broditaj vortoj „Libero aŭ morto“ sur ĝi.

En la unua tago de la ribelo en Panagjuriŝte, rajdanta sur nigra ĉevalo, armita per sabro kaj revolvero, Rajna Popgeorgieva, ĉe-kape de grandioza popola procesio, portas la ribelstandardon tra la tuta urbo. Ravite de tiu bildo, la popolo spontane nomis ŝin Rajna-Princino. Kaj kun tiu ĉi nomo ŝi eniris la historion. Ĝia nomo eterne brilos en la panteono de la senmortaj batalantoj por popola libero.

Kun mia samurbano Ivan Filov — esperantisto kaj instruisto en urbo Bankja (loĝanta en vilao „Rajna-Princino“ sur str. „Trapezica“ 14), ni konas nin jam delonge. Sed la fakton, ke li estas pranepo de Rajna-Princino mi eksciis nur la 6-an de januaro ĉi-jare en urbo Panagjuriŝte, kie mi ĉeestis solenajn omaĝoj al la 130-a datreveno de naskiĝo de la popola heroino. Li estis en la honora prezidantaro de la solena kunveno. Ankaŭ kelkaj aliaj reprezentantoj de ŝia posteularo ĉeestis, ĉe-kape kun ŝia nepo Hristo Dipĉev. Ilia ideo kunveni kaj konatigi ŝajnis al mi interesa kaj laŭdinda.

Boris ATANASOV, Bankja

KONCERTO DE SOFIA E-ĤORO

La 12-an de marto j. k. la Sofia Esperanto-Domo de Kulturo „M. Gorkij“ organizis por la sofiaj esperantistoj solenan koncerton dediĉitan al la XIII kongreso de Bulgara Komunista Partio. La riĉan koncertprogramon partoprenis la Ĥoro de Sofiaj Esperantistoj, junulara kantgrupo el 8-a Sofia mezlernejo kaj grupo da deklamantoj-esperantistoj.

N.V.

INTENSA CORSO DE ESPERANTO

Pasintjare aperis eta, poŝformata lernolibro „Bonan vojaĝon!” kun subtitolo „Esperanto por turistoj”, kies aŭtoroj estas Hanna kaj Andrzej Pettyn el Varsovio. Andrzej Pettyn mem gvidis jam kelkajn kursojn en diversaj urboj en Pollando, inter kiuj estas Bydgoszcz kaj Włocławek. En la lasta urbo partoprenis ĉirkaŭ 150 diversaj kursanoj, inter kiuj multaj instruistoj. . .

Jen kion diris A. Pettyn responde al miaj demandoj pri lia lernolibro kaj pri la metodo de li aplikata: „La lernolibro „Bonan vojaĝon!” ligiĝas kun la uzo de Esperanto por turismaj celoj. Ĝi enhavas komplekson de instruistoj. Siatempo mi fasciniĝis pri plej diversaj instrumantoj. Kaj mi konstatis, ke multaj personoj konas la lingvon pasive. Dum vesperaj kursoj la kursanoj venas jam lacaj post ilia profesia laboro, do oni devas paroli ne pri la lingvo, sed en la lingvo kaj la gramatikajn elementojn oni utiligu en la ekzerca praktiko.

Mia celo estas instrui al la kursanoj la kapablon de libera interkompreniĝo. Ĉiu kurso estas limigita de tempo. Mi celas aŭtomatigi la bazan frazaron por turismaj situacioj, elimini la timon paroli, tial dekomence mi enkondukas paroligajn ekzercojn. Dum la preparo de la lernolibro mi multobligis segmentojn kaj disdonis ilin al la kursanoj antaŭ la lecionoj. Mi celis alkitimigi ilin al memlernado. La instruisto estas nur helpanto en ilia studia laboro. Mi analizis la specon de famaj poliglotoj kaj provis apliki ĝin en mia laboro, ekz. la kursanoj mem gvidu la ripetadon aŭ eĉ la novan materialon dum la kurso. Tio mobilizas ilian atenton kaj fervoron prezenti bone la materialon kaj krome kreas memfidon je siaj propraj eblecoj lerni kaj regi la novan, lernatan lingvon.

La instruisto de muziko unue instruas gamojn. Poste sekvas etudoj, t. e. ekzercoj. La mallongaj dialogoj en mia lernolibro (kune kun la ŝanĝeblaj elementoj!) prezentas, ni diru, lingvogamojn kaj la etudoj,

t. e. la ekzercoj ebligas paroli je sia propra nomo per ŝanĝo de iuj elementoj kaj tiamaniere esprimi deziron, planon aŭ intencon. Mi prezentas la funkciadon de la lingva strukturo tiel: substantivon oni anstataŭigu per substantivo, verbon per verbo ktp. La instruisto laŭvoĉe prezentas la unuan frazon. La grupo ripetas ĝin. Kaj poste sekvas la variantoj de ĉiu frazo. Bezonata estas nepre kontrasto, ekz. Bydgoszcz — Las Vegas. Kompreneble la ĥora ripetado kuraĝigas la mal-kuraĝulojn. Poste sekvas individuaj ekzercoj, en kiuj la instruisto ne devas esti aktoro, sed reĝisoro! Li donas la scenaron kaj poste nur direktas, nur postulas la plenumon de la ekzercoj. Estus preferinde ke la lernantoj sidu en duoncirklo kaj la instruisto estu en ties centro, do ĉiu kursano devas bone vidi kaj la instruiston, kaj la ceterajn kursanojn. De la komenco ili devas alkitimigi paroli en pli vasta grupo kaj en akompano de intence aranĝita bruo, kiel fakte tre ofte okazas en la vivo mem. . . Depende de la sperto, la kursanoj povas mem daŭrigi la dialogon. Tiamaniere de la ekzercaj dialogoj oni povas alpaŝi disvolvitajn dialogojn, ĝis normala interhoma akto de komunikado. Sangante unue la dialogojn pere de la aldonoj frazelementoj kaj pli poste per aliaj, pli frue lernitaj elementoj, la kursanoj fakte neniam ripetas nur la modelan dialogon, sed kreas novajn dialogojn laŭ sia ŝato kaj prefero. Je dispono de la kursanoj estas 94 bazaj dialogoj, kio estas sufiĉe por praktike uzi Esperanton en la ĉiutaga vivo — kaj tio ne nur dum vojaĝo, sed ankaŭ en aliaj okazoj. . .

La metodo, kiun uzas Andrzej Pettyn, estas nomata kognitiva-komunika metodo. Eble iujn konfuzos la vorto kognitiva, kiu mankas en iuj E-vortaroj kaj eĉ en PIV. La radiko de tiu vorto estas *koni*, do la metodo estas koniga aŭ interkoniga-komunika metodo. Tiu metodo premisas, metas kiel antaŭkondiĉon, ke oni lernu la novan lingvon tute konscie! Per tiu metodo oni facile kontraŭagas, oni evitas la transferon, la negativan transferon de la nacia lingvo. (Transfero same mankas en iuj E-vortaroj kaj en PIV, tamen ĝi estas kiel faktermino uzata kaj signifas transportadon de elementoj/gramatikaĵoj de iu en alian lingvon. Se la gepatra (aŭ alia jam lernita) ling-

En la lando de lotusfloroj

(Daŭrigo de n-ro 4/1986)

JANGZI

Kun granda senpacienco ni daŭrigis la veturadon en suda direkto, al la plej granda ĉina rivero Jangz (Blua Rivero), longa 5 800 km. La Blua Rivero estas baptita de la francaj koloniistoj. Ĉinoj nomas ĝin Ĉanzi (Longa Rivero).

Kiam ni alvenis en la havenurbo Hankou, ĝia logantaro estis ĵus travivinta neordinaran inundon — la akvo atingis nivelon de tri metroj! Por kontraŭbatali la inundon estis mobilizitaj dekmiloj da soldatoj kaj civitanoj. Jen kion rakontis al ni iu el la riverstabo:


— Oni telefonis al ni, ke en la meza fluo de la rivero pluas torento, tagnocte. La ĉefstabo mobilizis dek milionojn da homoj kaj oni komencis fortigi la digojn, kiuj estis 140 kilometrojn longaj kaj du metrojn altaj. Dum aŭgusto la akvo atingis la nivelon de preskaŭ tridek metroj. La loka administracio petis helpon de aliaj pro-

vincoj. Kvin mil ĵonkoj alportis konstrumaterialojn, pajlomatojn, pumpilojn. luloke la akvo traboris la digon. Regimento da soldatoj sin premis unu al alia kaj ŝtopis la traboritan digon. Dekdu horojn ili staris kiel muro, ĝis oni riparis

la digon. Dank' al la amasa heroaĵo urbo Hankou estis savita.

Kiam ni alvenis en Hankou, la rivero kuŝis en sia kutima fluejo, sed la ĉirkaŭaĵoj estis akvoplenaj. Junaj kaj maljunaj fiŝkaptis, iuj per retoj, aliaj per hokoj, triaj per birdoj dresitaj tiucele.

La haveno de Hankou estas plenŝtopita de ŝipoj kaj ĵonkoj, kiuj transportas varojn. Mia akompa-



Konstruado de riverbaraĵo

vo malhelpas la lernadon de Esperanto per sia formo ktp, oni parolas pri negativa transfero). Per tiu ĉi metodo oni evitas la negativan transferon de la nacia lingvo, ĉar fakte oni studas la novan lingvon laŭ tute natura vojo — per koniga-dialoga maniero. Plenkreskuloj preskaŭ ĉiam komparas la lernatan lingvon kun la gepatra lingvo. Krome la vorto foje havas veran sencen nur en la frazo mem. Ekz. kukurbo: La kukurbo estas dolĉa. Via kukurbo estas malmatura. Kion signifas en la dua frazo kukurbo? Kapo? Aŭ pli ĝuste cerbo, ĉu ne? Do oni devas studi la lingvon ne per apartaj vortoj, sed per tutaj frazoj. En tia okazo ne ĉiam estas necese dediĉi multan tempon por klarigi la gramatikajn erojn, entenatajn en tiu aŭ alia frazo. Kaj tio estas ja la plej pozitiva flanko de tiu ĉi metodo, kiun uzas Andrzej Pettyn en sia nova lernolibro „Bonan vojaĝon!

La aŭtoro enkondukas ĉirkaŭ 500 vortojn, plej ofte uzatajn en Esperanto surbaze de frekvencaj listoj de la Akademio de Esperanto, de Internacia Kulturo Servo en Zagrebo kaj de la esploroj de d-ro Leo Blas, kaj ĉirkaŭ 500 vortojn, kiujn ili agnoskis kiel precipe taŭgaj dum kursoj por plenkreskuloj.

La lernolibro ampleksas 160 paĝojn, sur kiuj la lingva materialo estas prezentita en formo de 82 segmentoj, Esperanto-polan vortaron kaj vastan enkondukon. Ĉiu segmento konsistas el unu aŭ du mal-longaj dialogoj kun aldonaj frazelementoj, per kiuj la kursanoj variigas laŭ sia plaĉo la prezentitan skemon de la dialogo kaj tiamaniere aplikas ĝin pli bone en la praktikon. Komence de ĉiu segmento estas klarigoj nacilingve pri la gramatikaj renkontota en la segmento. Post la prezento de ĉiu dialogo sekvas unu aŭ kelkaj ekzercoj diverskaraktaraj, ekz.: 1) respondu al la demandoj, uzante la vortojn en krampoj (skribitaj nacilingve); 2) kompletigu la frazojn per donitaj en krampoj vortoj (nacilingve skribitaj); 3) faru frazojn uzante du bazajn vortojn (ekz.: lundo—ludi tenison: Lundo estas bona tago, mi intencas ludi tenison.), ktp.

La baza teksto kun titolo **La granda aventuro de Staĉjo Kompoto** konsistas el 10 ĉapitroj. Per sia ŝerca enhavo ĝi kaptas la atenton de la kursanoj. Inter

la apartaj segmentoj foje estas donita **Esperanto-leksikono** (entute 15-foje), en kiu ĉiujfoje estas informoj pri Esperanto, pri Esperantaj organizaĵoj, aranĝoj, movado kaj aliaj. Ĉiu segmento havas sian numeron per ciferoj kaj en krampoj per literoj, kio ebligas la enkapigon de la numeraloj sen aparta lernado.

La enhavo de la dialogoj (entute 185!) estas precipe el la ĉiutaga turista vojaĝpraktiko.

Konklude — la lernolibro „Bonan vojaĝon!“ taŭgas por ĉiu civitana kurso, ne nur por turistoj!

Marin BACEV

„Bonan vojaĝon! Esperanto por turistoj“. „Hanna Pettyn, Andrzej Pettyn (membro de la Akademio de Esperanto). Eldonita en Bydgoszcz, Pollando, 1984. Eldonkvanto: 15 000 ekz., 160 p., Formato: 10,5×14 cm. Prezo: 1200 zlotoj.

„TUTA“ '86 en ŽILINA

La 26.7.—1.8.1986, tuj post TUSE, okazos jam 8-aj Turismaj Tagoj en Žilina, CSSR. Organizantoj de „TUTA“ estas la E-klubo en Žilina kune kun la Regiona Komitato de SEA.

Dum „TUTA“ la partoprenantoj vizitos montaron Malgranda Tatra, kun fama Vratna-valo, Rokaron de Súlov kaj aliajn lokojn. La pied-ekskursoj okazos en 3 kategorioj: a) malfacilaj — ĝis 15-25 km; b) mezlongaj — ĝis 10-16 km; c) promenoj en la naturo (6-10 km).

La lasta kategorio estas konvena precipe por malpli junaj turistoj kaj por gepatroj kun infanoj. Por la partoprenantoj estas preparitaj ankaŭ tuttaga bus-ekskurso, rostado de lardo kun gustumado de slovaka brando, vesperaj amuzprogramoj kaj trarigardo de la urbo.

Detalajn informojn kaj aliĝilojn petu ĉe: Ing. Juraj Gondzúr, Levočáká 3 Vlčince 3, 010 08 Žilina-CSSR.

nanto invitas min observi la vivon de la riverhomoj.

— Ilia domo — parolas Lu Gang — estas la ŝonko. Sur ĝi naskiĝas kaj kreskas la infanoj, helpas siajn gepatrojn, kies profesio estas transportigi varojn.

Hankou estas urbo kun revoluciaj tradicioj. En oktobro 1911 en la urbo ekflamis ribelo, kiu disvastiĝis en centra kaj suda Ĉinio. En la flamoj de la ribelo cindrigis la Qing-dinastio. Dum la unua inter-civitana milito (1924/1927) Hankou kune kun la najbaraj urboj Uhang kaj Hanang estis la motoro de la antiimperiisma movado.

En la urba parko oni prezentis al mi veteranon de la unua revolucio. Mi petis lin rakonti pri sia partopreno.

— Bone, — ridetis la maljunulo. — En mia junaĝo mi posedis butiketon. Tio ebligis al mi kontakti kun revoluciuloj. Kiam en 1911 la ribelo sukcesis, la gvidanto de la ribelinta popolo ordonis al mi gvidi mian regimenton kontraŭ la soldatoj de Qing-dinastio. Ni surprizitakis la garnizonon kaj ĝi kapitulacis. Ni ribelis kun la espero, ke la vivo estigos pli bonstata, sed nenio rezultis. Ni devis

fari novan ribelon en 1949 por liberigi nin de fremdlanda kapitalo.

KANTONO

Pri la revoluciaj bataloj de la ĉina popolo ni informiĝis ankaŭ en Kantono, milionurbo ĉe Perla Rivero. En tiu ĉi urbo agadis doktoro Sun Jatsen (1866—1925). Sub influo de la ideoj de Oktobro'li preparis la popol-demokratian revolucion. Post lia morto, kiam reakciuloj faris puĉon, la proletoj de Kantono ribelis kaj fondis la gloran Kantonan Komunumon. Ĝi nuligis ĉiujn sklavajn kontraktojn, konfiskis proprajn de bienuloj. Usonaj kaj britaj militistoj surbordiĝis trupojn, kiuj buĉis pli ol sep mil patriotojn.

La ĉefstratoj de la urbo estas impresaj kaj elegantaj. Diverskoloraj reklamoj kaj nomoj de komercaj firmaoj flirts kiel flagoj. Kvankam estis aŭtuno, la varmego sur la stratoj estis sufoka. Lu Gang, kiu estis naskita en ĉi tiu urbo, proponis ke ni iru al la nacia parko.

Tie efektive estis tepide. Ni promenis inter orang- kaj mandarin-arboj pezaj pro fruktoj, preter mangoarboj kaj bananujoj. Ni observis,

kiel oni kolektas bananojn. La agronomino, kiu akompanis min, rakontis, ke en Suda Ĉinio kreskas diversspecaj bananoj. Ili fruktodonas trifoje dum la jaro. Aliloke ni vidis, kiel oni kolektas ananasojn. Proksimiĝinte al bambusa arbareto, ni aŭdis klom utila estas la bambuso.

— La bambuso estas kulturata kaj utiligata por plej diversaj celoj. La ŝosojn oni mangas, kaj el la branĉoj oni faras korbojn, ŝalmojn, akvokondukilojn, trabojn por domoj. Oni ellaboras meblojn, eĉ elegantajn bastonojn kaj ventumilojn. Cetere, en bambuaj bastonoj iam eŭropanoj kaŝe eksportis semojn de silkraŭpo. Tio okazis en la sesa jarcento. Depost tiam la silkraŭpoj trovis sian duan patrolandon en Suda Eŭropo.

Promenante tra la kamparo, ni observis kiel viraĵoj draŝas rizon per manfrapiloj.

— La rizo — parolis Lu Gang, — estas la ĉefa nutraĵo por ni ĉinoj. En tiu ĉi suda parto oni ricevas du rizrikoltojn jare. Ekzistas pli ol dudek specoj de rizo, sed la plej bonkvalita estas la speco „hinda“.

Mi demandis lin pri la malsano

LABORISTO KAJ SOCIAGANTO

Estimataj legantoj,

En numero 11/1986 de „BE“ ni rakontis al vi pri la interesa iniciato de laboristoj-esperantistoj en la Pan-produkta Uzino en Gabrovo. Per Esperanto-korespondado ili interŝanĝas profesion sperton kun siaj kolegoj el diversaj landoj, eĉ ili organizis Muzeon de Pan- kaj Pastoproduktado ĉe la entrepreno.

En nia nova rubriko „Esperanto en profesioj“ ni publikigos materialojn pri aplikado de Esperanto en diversaj profesioj, pri laboristoj-esperantistoj, pri la agado de laboristaj E-societoj.

Sur la paĝoj de nia revuo vi mem povas rakonti pri via kolego-samideano, pri via societo ktp.

„BE“

Ilija Andreev estas naskita en 1929 en urbo Loznica, distrikto de Razgrad. Lia laborbiografio komenciĝas en 1949 — li estigas traktoristo en sia naskiĝurbo. Poste li laboras kiel tornisto pri metalo en la Kombinumo por Produktado de Sargaŭtomobiloj — Ŝumen, kaj en la sovjho „Florgardeno“ en la Uzbeka SSR. Reveninte Bulgarion, li estigas instruisto en la Agrikultura Mezlernejo en sia naskiĝurbo. kaj ekde 1976 laboras en la Kombinumo por Prilaborado de Aluminio „St. Stamenov“ — Ŝumen. Unue li estis simpla tornisto pri metalo, kaj nun — brigadestro de la maŝinipara fako en la Gias Sekcio.

Pri Esperanto li unufoje ekscias en la klubejo de RMS¹. Poste li diligente lernas ĝin aŭtodidakte kaj finas E-kurson en urbo Pernik. Li estas unu el la fondintoj de E-societo „Progreso“ en la Kombinumo por Produktado de Sargaŭtomobiloj kaj de E-klubo „Metalurgo“ en Kombinumo „St. Stamenov“. Sindone li disvastigas Esperanton kiel multjara kursgvidanto, iniciatinto de grupvojaĝoj en alilando, amiko de l'pa-

co. Okaze de la 80-jara jubileo de E-societo „Vekiĝo“ — Ŝumen, li estis distingita per la Ora Insigno de nia Asocio. Li estis delegito de nia brila 41-a nacia kongreso.

Ilija Andreev estas fervora teknikisto. Li ŝatas legi teknikajn librojn kaj revuojn, interesigas pri teknikaj novaĵoj. Li estas entuziasma raciiganto kaj inventisto. Tial li tutkore akceptis kaj aliĝis al la decidoj de la Februara Plenkunsido de CK de BKP en 1985 por efektivigo de scienc-teknika revolucio en nia lando. Li estas aktiva membro de la kombinuma klubo de raciigantoj kaj malavare helpas la junajn teknikistojn. Li mem kompilis kaj tradukis en Esperanton reklambroŝuron pri la Kombinumo, kiu estas dissendita al dekoj da landoj. Responde jam venis multaj proponoj pri kunlaborado kaj interŝanĝo de sperto. Jen kion li mem rakontas pri sia teknika agado: „Kiom da raciigoj mi proponis ĝis nun, mi ne povas ĝuste diri. Sed se mi dirus 30, mi ne erarus. El ili aprobitaj estas 10—12. Kio igas la homon esti raciiganto? Lia senpacieneco, lia fervora partoprenado en la laborproceso. Por esti raciiganto, oni devas interesiĝi pri ĉio nova en sia profesio. Nu, kia raciiganto mi estas? Ĝis nun mi ricevis monpremiojn nur por du el miaj proponoj. De miaj raciigoj mi ne atendas personan profiton — mi volas faciligi la homan laboron, ŝpari materialojn. La esperantistoj el la kombinuma klubo „Metalurgo“ partoprenas aktive la landan esperantistan vivon. Jam estas starigitaj kontaktoj de la esperantistoj el la kombinumo kun kolegoj el la Kombinumo por Prilaboro de Aluminio en urbo Szekesfehervar (Hungario) kaj kun kluboj en Germana Demokratia Respubliko, en Pollando, Ĉeĥoslovakio, Anglio.

Cvjatko TODOROV

beribero, kiu atakas la rizmangan-tajn.

— Tiu ĉi danĝera malsano estas ŝuldata al la manko de vitaminoj en la rizo. Kiam oni konsumas nur poluritan rizon, tiam oni malsaniĝas je beribero. Niaj homoj konsumas rizon kun brasiko kaj la malsano ne trafas ilin.

Dum la vagado tra la kamparo mi eksciis, ke Lu Gang havas ĉi tie, en Kantono, fianĉinon, sed ne konas ŝin.

— Kiel do eblas? — miris mi.

— Laŭ malnova tradicio, mi estis fianĉigita en mia infanaĝo. Nek mi konas ŝin, nek min ŝi. Tiu kutimo ne plu estas respektata en nia lando.

Ankaŭ sur la Perla Rivero loĝas sur boatoj pli ol 200 mil homoj. Oni nomas tiun kvartalon „Naĝanta urboparto“. Tutaj familioj loĝas sur ŝonkoj, ĉar ili posedas nek grundon, nek dometon. Simila vivmaniero ne estas konforma al la reguloj de la higieno. En la pasinteco ofte ekflamis epidemioj de ĥolero kaj pesto. Nun la sanitariaj servoj severe kontrolas la „Naĝantan urboparton“.

Iumate ne ni kun Lu Gang pied-

ris al la riverhomoj. La ŝonkoj, ordigitaj unu apud la alia, formas „aleojn“, po dudek ambaŭflanke. Ĉiu aleo havas sian numeron. Ĉirkaŭ la ŝonkoj ludis infanoj, ĝis lumbe en la kota akvo. Neniu el ili dronis, ĉar ili estis zonitaj per ŝtipejoj el Hajnana arbo, kiu estas pli malpeza kompare kun la ŝelo de korkokverko. Ĉar centoj da infanoj naĝis sur la rivero, mi demandis, kiamaniere la ĉina virino kreskigas tiom multe da idoj.

— La ĉinino estas sperta en kreskigo de infanoj. Por ŝi kvin-ses infanoj estas afero ordinara. La unuenaskito zorgas pri la dua, la dua pri la tria ktp.

Iuj infanetoj, satludinte, enĵonkigis kaj petis matenmangon. Estis amuze observi, kiel ili manipulas per la vergetoj.

La „naĝanta urboparto“ vigligis. Iuj ŝonkoj albordigis, ŝargitaj per bananoj, batatoj, brasiko, oranĝoj.

La tuturba komitato zorgas pri edukado de la riverhomoj. Ili disponas kulturdomon sur la rivero. Ni vizitis ĝin. Nin bonvenigis la administrantino. Ŝi parolis ian jarĝonon, kiun Lu Gang ne povis

kompreni sen hieroglifoj. En sia notlibreto ŝi desegnis la hieroglifojn kaj Lu Gang deĉifris ilin. El tiu ĉi stranga dialogo mi komprenis, ke ankaŭ ŝi kreskis sur ŝonko. Ŝi rakontis, ke antaŭ la revolucio oni ne permesis al la riverhomoj loĝi sur tereno. Nun ĉiu, kiu volas forlasi la riveron, povas fari tion.

En Kantono laboras miloj da metiistoj, kiuj produktas diversajn lakitajn objektojn. Post longa prilaboro ili servas kiel teglasoj, kvankam estas faritaj el tolo aŭ silko. Pro memoro ni aĉetis multekostajn figurojn el elefantaj dentoj, glasetojn el fajna porcelano.

Dum la restado en Kantono mi gustumis stranganĝajn mangajojn, ekz. nestojn de salangano. Tiu ĉi birdo loĝas en suda Ĉinio. Ĝi similas al la hirundo, sed ne konstruas siajn nestojn el koto kaj pajleroj, kiel faras la hirundoj, sed el la propra salivo. Kiam la nesto estas finkonstruita, la birdasistoj ŝtelas la neston kaj la salangano komencas denove konstrui novan. Mi gustumis neston kuiritan kaj ĝi havis la guston de kaviaro.

Alifoje ni mangis rostitajn ko-

juna esperantisto

LETERO AL ĈIUJ, KIUJ DIRUS: TIO NE KONCERNAS MIN!

Karaj junaj gesamideanoj,

Dum sep orkoloraj tagoj de la pasintjara aŭtuno kun multe da emocio ni kune pridiskutis problemojn de nia junulara E-movado, pripensis la formojn de varbado kaj reteno de gejunuloj en niajn vicajn. Kaj finfine, antaŭ la disiĝo, en IEK-Pisanica, kie ni okazigis nian tradicion junularan seminarion, ni promesis labori por plenumo de la starigitaj taskoj. Por ke vi ne forgesu nin, kaj por helpi al vi, ni sendis al vi kaj al la prezidantoj de viaj distrikta estraroj memorigajn leterojn. Ni atendis de vi ĝis la 15-a de marto 1986 planojn pri la E-agado de la gejunuloj en via distrikto kaj pri ilia nombro. Por faciligi vin ĉe preparo de la planoj kaj por helpi al vi gajni premion, ni sendis al vi ankaŭ la indicojn pri la konkurado „100 jarojn Esperanto“ organizita por la junularaj E-grupoj en la lando.

Ĝis nun, karaj geamikoj, ni ricevis nur kvar planojn. Ĉu ni sukcesis gajni la amon de nur tiom da homoj el vi? Aŭ vi havas interesan organizan vivon, sed vi preterlasis sendi al ni viajn planojn? Aŭ vi, sed tio estas preskaŭ nekredebla, entute forgesis nin? Ĉu vi havas problemojn, ĉu la distrikta estraro helpas al vi?

Porinforme ni diros al vi, ke ni ricevis la vere interesajn planojn de viaj kolegoj el Targovište, Plovdiv, Silistra kaj Jambol. El la lasta urbo eĉ alvenis letero, subskribita de la prezidanto de DE de BEA. B. Iliev, kun ĝusta nombro de la junaj esperantistoj en la distrikto. Ili estas entute 223, organizitaj en urbaj societoj kaj lernejanaj kluboj.

En la planoj estas multe da iniciatoj kiel ekzemple: partopreno en la Nacia Revuo de E-Rarolo kaj Kanto, ekskursoj, regula partopreno en E-kunvenoj, aktiva korespondado ktp. La antaŭvidataj iniciatoj estas konkretaj, kun limdatoj por plenumo kaj respondecu-joj.

Mi ŝatus elnombri iujn el la interesaj planitaj aranĝoj.

Jambolanoj skribas: preparo de programo en Esperanto por la radiostacio en Jambol, aktiva partopreno en la organizita „Parolanta Rondo“, kunlaboro de lernejanaj E-klubo el la distrikto kun similaj enlandaj kluboj, partopreno en la E-laborbrigado.

La junaj esperantistoj el Targovište decidis: dum lernado de la lingvo progresintoj regule helpos al postrestintoj; oni organizos partoprenon en la lernejanaj festivaloj de amatora arto per E-kantoj kaj versaĵoj, renkontigon kun esperantistoj-samaĝuloj el Veliko Tŕrnovo.

Niaj amikoj el Silistra promesas viziti aranĝojn de esperantistoj en Gabrovo, gastu al soldato-esperantisto en urbo Balĉik, kune festi naskiĝtagojn.

Interesa estas ankaŭ la programo de plovdivanoj, kiuj antaŭvidas tri ciklojn de prelegoj: „E-movado en urbo Plovdiv“, „Monda E-movado“ kaj „La kreinto de la Internacia Lingvo“; okazigo de distrikta junulara seminario pri la rolo de Esperanto en la pacbatalo, aperigo de propaganda prospekto (bulgarlingva) pri Esperanto kaj pri la E-movado.

En la planoj oni aliras la atenton al iniciatoj ligitaj kun reteno de la gejunuloj en niajn vicajn, sed estas forgesitaj la gejunuloj, kiujn ni devas varbi.

Ni, estimataj legantoj, adresas tiun-ĉi leteron ne nur al niaj junaj amikoj kaj kolegoj el la Komitato de BEJ, sed ankaŭ al DE de BEA, al ĉiu esperantisto, kiu interesiĝas pri la sukcesa estonteco de nia E-movado.

Ne forgesu, karaj junaj gesamideanoj, ke la limdato por ricevo de la raportoj pri via partopreno en la konkurado „100 jarojn Esperanto“ estas 31-a de julio 1986. Al vi ĉiuj ni bondeziras sukceson, sed por la sukceso oni devas „batali“ t. e. aktivii!

Estu sanaj, feliĉaj kaj agemaj!

En la nomo de la Buroo de la Junulara Sekcio ĉe BEA Maria JANKOVA, sekretario de BEJ

librojn — tre malgrandaj birdetoj el la ordo de apusiformaj birdoj, ankaŭ frititajn koretojn de paseroj.

Sekvis pladoj el frititaj ranoj, kompreneble, oni mangas nur iliajn femuretojn. Mi perdis la apetiton, kiam oni prezentis al ni la pladon „Drako, tigro kaj fenikso“.

Vidante, ke mi ne emas gustumi, Lu Gang diris:

— Vi bedaŭros. Gustumu ĉion, kion proponas la lokaj kuiristoj. Ili estas senkomparaj en sia profesio. Ili preparas mangaĵon el ĉio, kio flugas, naĝas kaj rampas. La proponata plado „Drako, tigro kaj fenikso“ konsistas el trispeca viando: de serpento „goŝunjun“, de katido kaj kokido. Vi certe demandas, kial kantonanoj mangas ĉion? Iam la urbo estis sieĝita de malamikoj kaj la sieĝitoj mangis ĉion, por ne morti pro malsatado. Depost tiam oni konsumas ĉion...

Forlasinte Kantonon, ni veturis norden. En la kupeo sidis nur ni ambaŭ. Lu Gang estis malgoja. Li klarigis la kaŭzon:

— Lastnokte, dum vi dormis, mi iris hejmen. En Kantonon loĝas mia patrino kaj fratino. La disiĝo estis doloriga, ĉar eble mi ne vidos ilin denove. La veturkostoj

de Pekino, kie mi laboras, ĝis Kantonon, estas altaj... Nek mi, nek ili havas tiom da mono por veturi per trajno.

Lu Gang rakontis al mi sian historion. Li naskiĝis en la jaro 1924 en malriĉa kvartalo de Kantonon. Dum la Komunumo lia patro servis ĉe la revoluciuloj. Post frakaso de la ribelo la familio fuĝis al Makao — portugala haveno —. Tie lia patro luis taverton sed en 1944 li mortis. La familio revenis al Kantonon. En 1947 Lu Gang aliĝis al la gerilo kaj partoprenis la liberigon de Kantonon. La junkomunista organizaĵo sendis lin al Ljuŝin, kie li studis rusan lingvon. Li ricevis diplomon de tradukisto kaj nun tradukas prozaĵojn kaj artikolojn el la rusa.

— Mi estas kontenta de mia profesio, — deklaris Lu Gang. — Mi ekkonis la rusan literaturon, la rusan arton, la rusan filozofion, la verkojn de Lenin...

HO MO GO
(Daŭrigota)

1 Temas pri la ideoj de la Granda Oktobra Socialisma Revolucio 1917 — Noto de Red.

La plej grava internacia arango, organizata de Bulgara Esperanto-Junularo en la lastaj jaroj estas la Internacia Junulara E-Seminario por Aktivuloj. Ĝi fariĝis ja tradicia kaj ĉi-jare por oka fojo la aktivularo el nia kaj el diversaj aliaj landoj kolektiĝos por kunvivi dum unu semajno (29.09.—05.10.) en agrabla etoso kaj amika E-rondo, traktante interesajn kaj gravajn momentojn de la E-movado en la komforta Internacia Esperanto-Kursejo, Pisanica.

La dezirantoj povos viziti la seminarion, anticipe aliĝinte ĝis la 15-a de septembro j. k. kaj pagante per IEK po 16 usonajn dolarojn por ĉiu tago aŭ 120 levojn por la tuta restado. La restadkostojn de la invitotaj eksterlandanoj pagos BEJ.

La ĉeftemo estas „100 jarojn Esperanto“ — temo aktuala kaj enhavoriĉa. En la programo oni antaŭvidas jenajn prelegojn:

- 1) „Historiaj premisoj pri la apero de internacia komunika rimedo. Provoj por kreo de tia rimedo antaŭ Esperanto.“
- 2) „La kreinto de Esperanto — d-ro L. L. Zamenhof: personeco, ideologio, lingva kulturo“.
- 3) „Unuaj originalaj kaj tradukaj verkoj en Esperanto. Unuaj E-periodaĵoj“.
- 4) „Kial Esperanto ekzistas jam 100 jarojn! La kaŭzoj, pro kiuj venkis tiu internacia lingvo.“
- 5) „Fondigo kaj disvolviĝo de UEA kaj TEJO“.
- 6) „Penetro de Esperanto en Bulgarien. La unuaj bulgaraj esperantistoj. Unuaj E-eldonoj kaj E-periodaĵoj.“
- 7) „Disvolviĝo de la E-movado en Bulgario.“
- 8) „Partopreno de BEA en UEA- kaj TEJO-aga-

do.“ La partoprenontoj povus prelegi laŭ libere elektita temo, sed ligita kun la ĉeftemo, kaj anticipe anonci al la organizantoj.

La plej grava parto el la seminaria programo estas pridiskutoj de la junulara E-aktivado en la diversaj distriktoj de nia lando. Oni anoncos la rezultojn de la unujara konkurado „100 jarojn Esperanto“ inter la junularaj E-grupoj en Bulgario.

Okazos ankaŭ ekskurso kaj libervole elektitaj distroj.

Ciuj interesigantoj ricevos pli detalajn informojn de BEJ: 1303 Sofio, bul. „Hr. Botev“ 99, tel. 32-40-68 ĝis 15.08.86.

Mariana ELENOVA

VARMAJ RENKONTIGOJ

Oficiala invito de Bulgara Esperantista Junularo (BEJ) ebligis al mi en decembro 1985 pli profunde konatiĝi kun la bulgaraj pejzaĝoj, urboj kaj kun ties amikemaj enloĝantoj. La spertoj kaj valoraj opiniointerŝanĝoj kun junaj, mezaĝaj kaj veteranaj esperantistoj en Sofio, Vraca, Veliko Tŕrnovo, Etŕr, Sipka, Plovdiv kaj Pisanica havigis al mi la pruvon, ke la esperantaj lingvo kaj movado vivas en lando, en kiu nelaste ankaŭ la registaro forte kontribuas al la stabila kaj daŭra ekzistado de la esperanta fenomeno, kiu kunligas homojn de diversaj naciecoj kaj pensmanieroj. Apartan dankon mi esprimas al Ljubomir Trifonovski el Vraca, estrarano de BEJ, kiu lerte organizis la programon kaj entuziasme prezentis al mi la perlojn de Bulgario kaj de la riĉa bulgara kulturo. La multaj diapozitivaj, kiujn mi portis hejmen, servas al multflanka prelego en Svislando, kiu prezentu interesan Bulgarien.

Andy E. KŬNZLI, Svislando,
redaktoro de „Tejo-tutmonde“

Nova arta klubo

En la distrikto de Haskovo jam plurajn jarojn agadas spertaj E-poetoj kaj tradukantoj. Ili aktive partoprenas en la kulturala vivon ne nur de nia distrikta E-societo, sed ankaŭ de la tuta nacia kaj internacia E-movado, kontribuas per siaj tradukoj kaj originalaj poemoj al „BE“ kaj al aliaj E-periodaĵoj.

Malgraŭ ke ĝis nun la grupo de E-poetoj kaj tradukantoj en Haskovo ne estis oficiale organizita, ĝi jam montris konsiderindajn sukcesojn. En la konkurso de traduka poezio de Penjo Penev, organizitan de DE de BEA — Haskovo, de la Distrikta Fakoj pri Kulturo en Haskovo kaj de la Komunuma Fakoj pri Kulturo de Dimitrovgrad, en 1984, lige kun la 54-jara datreveno de naskiĝo kaj 25-jara datreveno de morto de la poeto-esperantisto, partoprenis kaj gajnis premiojn Nikola Pilev kaj Nikola Uzunov el Haskovo kaj Jeljo Delev el Dimitrovgrad. Frukto de ilia aktivado estis ankaŭ la antaŭnelonge eldonita en Esperanto poemaro de Penjo Penev „Homoj antaŭen!“, kiu rapide fariĝis necesajo por la sinpreparo de partoprenontoj en la XIX Revuo de Esperanto-Parolo kaj Kanto en Razgrad. Preskaŭ la duono de tradukoj en la poemaro estas faritaj de tradukantoj el Haskovo kaj Dimitrovgrad.

La ĉiuflanka aktivado de la E-poetoj en la distrikto de Haskovo estis detale pridiskutita dum renkontiĝo okazinta la 5-an de februaro j. k. en Haskovo. Partoprenis pli ol 20 membroj de la E-societoj en Haskovo kaj Dimitrovgrad, kiuj emas traduki, verki, deklami, aktori en Esperanto. Aŭtoroj legis siajn originalajn versaĵojn en Esperanto. Responde al la rekomendo de CE de BEA kaj persone de ties prezidanto k-do Hristo Gorov, oni pritraktis la demandon pri starigo de organizita grupo de artistoj en la distrikto. Post la diskutoj estis fondita „Arta Klubo“ kiel sekcio de la Sofia Esperanto-Domo de Kulturo „M. Gorkij“. En la kluba estraro estis elektitaj Nikola Pilev, Nikola Uzunov kaj Penjo Stojanov. La klubanoj kunvenados la unuan merkredon de ĉiu monato.

En la plano de la nova klubo oni antaŭvidas: partoprenon per originalaj poeziaĵoj en la eldonota okazo de la 80-jara jubileo de BEA Almanako de originala E-poezio kaj prozo „Rozo kaj Glavo“; gastadon per deklamaĵoj al E-kunvenoj; kunmeton de Kantaro el bulgaraj popolkantoj en Esperanto, eldonon de Poemaro el originalaj kaj tradukaj poeziaĵoj de la klubanoj k. a.

Ni bondeziru fruktodonan laboron kaj novajn sukcesojn al la Arta Klubo en Haskovo.

Ing. Nikola UZUNOV



GEORGI ĜAGAROV

KONFESO

Turmentas min nur la demando,
ĝis nun, ĝis horo tiu ĉi,
ĉu marŝis sub la ruĝstandardo
kuraĝe kaj fidele mi?

Se vojon mi retrorigardas,
nenion brili vidas mi,
krom tio, ke vi ame gardas
kaj min survoje gvidas vi.

Sur mia voj' ne unufoje
abismen sekvis ĉiu pint'. . .
De timo kaj hezit' survoje
pri vi imago savis min.

Jen mia kanto kelklinia,
sed en rigora ĉi jarcent'
la venko kaj la himno via
reeĥu en la firmament'!

El la bulgara: Nikola UZUNOV

POST HAJLO

Hajlis ŝtormo
ŝtormis hajlo.
Ĉio iĝis preskaŭ pajlo.
Restis nur trunketoj
malabundaj
kaj tro multaj vundoj, vundoj.
La kreskaĵoj tamen ne lamentas.
Sole staras en silento.
Eble ĉiu viva ĉelo
pensas pri morgaŭa helo!

NIKOLA PILEV

GEORGI MIĤALKOV

PACO

Paco — granda, ŝtona vorto!
Portas vi liberon, sunon —
vi lumigas tutan mondon,
karas via hela lumo!

„Pacon!“ — jen patrina flustro
kun espero, kun tenero —
dolĉe la infanoj dormas
sub la steloj de l'ĉielo.

Paco — freŝa pluv' por floroj!
Paco — kant' patria, milda,
ora greno, verd-kamparo!
Paco — gaja junio mia!

Flugu, flugu, ho ne haltu!
Ĉesu sangaj bestaj dramoj!
Luktas miaj bravaj fratoj
kaj pereas en la flamoj!

Paco — venas hor' nun lasta!
Vidas mi, mi firme kredas:
en la bela mondo vasta
post batal' — vi reaperas!

(Januaro 1986)

(El baldaŭ aperonta poemaro „Rozo kaj Glavo“)

PRINTEMPO PACA

Akrostike al la pacemuĵoj tutmondaj

Printempo venas — universdancino,
Revata ŝvebas ĉarmulin' ravanta,
Intime lumon verŝas, resavanta
Nin en la vintra frosttremiga sinò.
Tra l'kamp', arbar', montar' — per kant'
vekitaj,

Etendas manojn ŝi por vivobeno;
Mildece kisas nin per sunreveno.
Por fari kontinentojn renaskitaj
Ornamas verdkolore, flore l'mondon.

Venkritme rekantigas terbirdaron,
Ekmovas brile, trile amoonon;
Nun plenespere vere verdfeino
Alportas pacesperon al homaro.
Saluton, ho plej bela pacistino!

Bonkora florprincino, malavare
En Pacojaro nia finestigu
Longtempe avidatan tuthomare
Amatan pacon kaj nin feliĉigu!

Asen JOSIFOV





Asen Grigorov gaste al Elvira Lippe en urbo Fumala, Latva SSR. Sur la foto: Asen Grigorov, Elvira Lippe (en la mezo), Ljudmila Jevsejeva kaj hundo Tumulto en la ĝardeno de Elvira Lippe.

Muziko en malliberejo

Foje ni gastis al la gvidanto de nia Literatura Rondo samideano Asen Grigorov — bona homo, ĉiam preta helpi al ni en nia literatura laboro kaj lingva perfektigo.

Inter la gastoj estis ankaŭ juna violonistino. Ŝi ludis por ni erojn el verkoj de Mozart kaj de aliaj famaj komponistoj.

La dommastro, kiu kuŝis en la lito, ĉar lia kruro malfeliĉe estis rompita, atente aŭskultis. Kiam la violonistino ĉesis ludi, li ekparolis: „Antaŭ multaj jaroj, pro miaj progresema-

ideoj, mi estis arestita kaj ĵetita en malliberejon. Tie estis ankaŭ multaj niaj kamaradoj, kiuj batalis por libero kaj bonaj vivkondiĉoj de ĉiuj homoj.“

„Ĉiutage, — daŭrigis nia gastiganto, — oni permesis al ni eliri el la malliberejaj ĉeloj, kie ni estis ŝlositaj, kaj promenadi iomete en la mallibereja korto. Tie ni miksigis kun homoj arestitaj pro diversaj kaŭzoj.

Foje en la homamaso mi vidis ciganon kun violono. La muzikema cigana koro ne povis resti trankvila kaj li komencis ludi. Miaj brakoj per si mem etendiĝis al la violono kaj mi petis la ciganon prunti ĝin al mi.

Miaj fingroj, soifaj por muziko, delikate ek-tiretis la kordojn, poste mi prenis la arĉon kaj komencis ludi.

Mian koron plenigis neordinara ĝojo. La muroj de la malliberejo malaperis, mi estis en la libera, belega mondo de muziko.

Mi ludis! Ludis miaj feliĉaj fingroj, kiuj de longe ne estis tuŝintaj violonon. Ludis mia korol! En mia animo ekbrilis suno, mi vidis la kampon plenan de floroj kie, estante gimnaziano, mi ludis por mia malgranda amikino. . .

Sentinte ies manon sur la ŝultro, mi malfermis la okulojn. Apud mi staris la gardisto, kiu faris al mi signon, ke estas tempo reveni en la ĉelon. Mi ekspiris profunde kaj ekrigardis la homojn ĉirkaŭ mi — iliaj okuloj brilis pro feliĉo. La cigano ridetis. Li ankoraŭ estis en la mondo de muziko kaj eble li tute ne revenos en la malliberejon, ĉar preninte la violonon el miaj manoj, ludante en la ĉelo, li sentos sin libera“

Neniu el ni forgesos la emocian rakonton pri la forto de muziko aŭdita en malliberejo.

Nevena NEDELĈEVA

VIRINA FESTO

La 5-an de marto j.k., okaze de la Internacia Virina Festo — 8-a de Marto, en la salono sur strato „Serdika“ 13 kunvenis multaj geesperantistoj el Sofio. La kunveno estis organizita de Sofia Esperanto-Kulturdomo „M. Gorkij“ kaj de Sofia E-societo „Kosta Penev“.

En la feste ornamita salono estis aranĝita ekspozicio de manlaboraĵoj: broditaj tablokovriloj, popolistilaj kaj puntaj, trikotaĵoj ka. Por ĉiu el la ĉeestantaj virinoj estis bela floro kaj donaceto. La ĉeestantojn oni regalis per frandaĵoj preparitaj de la lertaj virinaj manoj.

Sabina Apostolova, prezidantino de societo „Kosta Penev“, parolis pri la vivo de ilia patrono Kosta Penev — kuraĝa batalanto kontraŭ faŝismo kaj kapitalismo kaj sindona aktivulo de la E-movado. En la

nomo de CE de BEA, ĝia vicprezidanto Petăr Todorov gratulis la virinojn okaze ilia festo kaj subtekis la grandan rolon de virinoj en la nuntempa socialisma socio kaj en la pacbatalo. En la nomo de la Virina Komisiono ĉe BEA salutparolis Belka Beleva.

Ivan Peev, sekretario de Sofia Urba Estraro de BEA, dekoris per la Ora Insigno de BEA la aktivulinon Gergina Vajarova, Maria Taŝeva kaj Nadja Petroviĉ.

En la riĉenhava belarta programo partoprenis la E-poetino Antoaneta Atanasova kaj aktorinoj el la Bulgara Esperanto-Teatro. En sia festotago ili verve kaj inspirite priantis la patrinan amon, la tenecon de la virina koro.

La organizantoj zorgis ankaŭ pri la bona etoso: gabrovanaj ŝercoj plenumitaj de V. Dakovska kaj L. Coneva, kvizo, amuza tombolo kaj multe da muziko.

Vera RAJKOVSKA



EMILIJAN STANEV EN ESPERANTO

Emiljan Stanev, *Ŝtelisto de persikoj*. Elektitaj noveloj kaj rakontoj. Kompilis P. Todorov. Tradukis Asen Grigorov. Eldonis „Sofia Pres“, Sofio, 1985., p. 130. Aĉetebla ĉe BEA.

Okaze de la Centjara jubileo de Esperanto Agentejo „Sofia Pres“ proponas al siaj legantoj-esperantistoj tradukon de du noveloj kaj sep rakontoj de unu el la plej eminentaj reprezentantoj de la nuntempa bulgara literaturo — Emilijan Stanev.

Elekti nur kelkajn verkojn por prezenti grandan majstron de la belarta prozo estas afero tre malfacila. Tamen ĉiuj, kiuj bone konas lian verkaron, tuj rimarkos ke la kompilinto Petăr Todorov sukcesis fari tion. La du noveloj — „Ŝtelisto de persikoj“ kaj „En kvietan vespero“ — estas rimarkindaj per la granda penita talento de Emilijan Stanev. Ili estas kompakta, streĉaj verkoj, en kiuj la verkisto majstre prezentas la psikan staton de siaj herooj, iliajn interrilatojn en eksterordinare plastikaj bildoj, kun detaloj, kiuj parolas pri rara arta observemo.

La sep rakontoj estas elektitaj el la granda ciklo pri bestoj kaj pri naturo — ĉeftemo en la verkaro de Emilijan Stanev. En la bonega antaŭparolo al la novelaro la fama literatura historiisto, nia samideano akademiano Petăr Dinekov skribas: „Tie ĉi aperas unu el la paradoksoj en la verkaro de Emilijan Stanev — la verkisto-ĉasisto profunde amas la bestojn, tial li scipovas priskribi ilin per sincera kompato, kun simpatio pentras ilian sorton. Li perfekte konas ilian mondon; al tiu ĉi kono aldoniĝas ankaŭ la imagopovo, kiu permesas al la verkisto superi la empiriajn observojn kaj proksimigi al ni laŭ pure homa maniero la sorton de la birdoj kaj bestoj, kun iliaj ĝojoj kaj zorgoj, kun ilia senĉesa batalo por ekzistado — sorton ofte tragikan. En tiu ĉi mondo la vivo kaj la morto interrilatas konstante, sed malgraŭ la avido de l'morto la vivinstinkto neniam malaperas. Do finfine la mondo de bestoj reflektiĝas tra la rigardo de homo, sed la vidpunkto ofte ŝanĝiĝas, kio determinas ankaŭ la interesan internan strukturon de la rakontoj“.

Traduki belartan literaturon estas ĉiam malfacile, sed kion diri pri traduko de verkoj de Emilijan Stanev, en kiuj, denove laŭ akademiano Dinekov, speguliĝas la plej puraj fontoj de la bulgara lingvo, ĝia tuta riĉeco kaj ebloj pri poezia eldiro, ĝiaj fleksebleco kaj povo transdoni homsentojn kaj rezonadojn, ĝia tuta rafiniteco kaj belsoneco.

La sep rakontoj estas tradukitaj de nia fama tradukisto kaj poeto, la neforgesebla Asen Grigorov, la novelon „Ŝtelisto de persikoj“ tradukis ing. Nikola Uzunov, kaj la novelon „En kvietan vespero“ — ing. Petăr Todorov. Atenta komparado de la tradukoj kun la originalo tuj montras, ke la tradukistoj laboris tre serioze: profunda kono de la verkaro de Emilijan Stanev, perfekta posedo de la lingvo, ĝusteco, sento

pri respondeco, riĉa vortaro kaj figura stilo, maksimuma fideleco al la originalo.

Tre grava eco de la proponitaj tradukoj el la verkaro de Emilijan Stanev estas ilia bonega arta sonado. Legante ilin, oni havas la senton ke oni legas originale verkitajn en Esperanto novelojn kaj rakontojn de granda majstro.

La apero de la novelaro „Ŝtelisto de persikoj“ estas granda kontribuo al la traduka Esperanto-literaturo. Mi estas certa, ke ĉiu, kiu tralegos ĝin, ekdeziros legi novajn kaj novajn verkojn de tiu ĉi granda nuntempa aŭtoro de belarta prozo.

Venelin MITEV

POSTKURSAJ LEGAĴOJ

Postkursaj legaĵoj. Kunmetis Violin Oljanov kaj Neno Janev. Eldonis la Ofsetpresejo de BEA, 1985. 21.5×15.5 cm, prezo 0,55 lv.

Jam la titolo konvinkas nin, ke temas pri nova lernilo, destinita por kursanoj finintaj la komencan kaj daŭrigan kursojn de E-lernado. Ĝi konsistas el du partoj: en la unua enestas anekdotoj, mallongaj rakontoj, humuraĵoj, kies facileco kaj mallongeco konvenas por komencantoj; la dua parto enhavas legaĵojn originalajn kaj tradukajn, pli komplikajn, kiuj povas helpi kursanojn en ekposedo de la lingvo dum kaj post duagrada kurso.

La du libropartoj estas sukcese kompilitaj. Unuflanke, la libro estas riĉa je diversgenraj legaĵoj — anekdotoj ordinaraj, historiaj, sciencaj; fabloj kaj fabeloj diversnaciaj; rakontoj; versaĵoj; fragmentoj el romanoj; leteroj; legendoj. Aliflanke, sian lokon trovis: eminentaj aŭtoroj-esperantistoj — d-ro L. L. Zamenhof, Kabe, Asen Grigorov, Violin Oljanov; bulgaraj klasikuloj — Ivan Vazov, Hristo Botev, Jordan Jovkov k. a.; nuntempaj verkistoj — Penjo Penov, Valeri Petrov k. a.; eksterlandaj aŭtoroj — Andersen, Devjatnin, Voltaire. Krome, la Internacia Lingvo estas bonege prezentita per originalaj verkoj, tradukoj de elstaraj bulgaraj kaj eksterlandaj tradukistoj kaj junaj talentaj esperantistoj — anoj de la Tutlanda Amika Rondo de Tradukemuloj (TART).

Ordigitaj laŭ la facileco de ties lingvo, la legaĵoj helpas bonan komprenon de E-parolado, stabiligas la konojn ricevatajn en la kurso, alkitimigas al bona kaj facila legado kaj parolado, pliriĉigas la vortprovizon de la legantoj, konigas al ili interesajn faktojn el la historio de la E-movado.

Krom por kursanoj, la libro estas utila ankaŭ por kursgvidantoj — por variigo de la instrulaboro, por plibonigo de la etoso en la klasĉambro. Ĝi estas utiligebla ankaŭ por ekzameno.

La aŭtoroj povus eviti iujn mankojn. E-lernilo ĝenerale ne estas multnombraj kaj ili estas uzataj de multaj esperantistoj, pro tio en ĉi-lasta povus ne ripetigi iuj legaĵoj („Malfeliĉa komercisto“, „Diogeno kaj Aleksandro“), kiuj jam estas en aliaj E-legolibroj. La legolibro estus pli kompleta, se en ĝi estus ankaŭ legaĵoj por komencantoj, pli da anekdotoj, pensoj de eminentuloj-nesperantistoj pri Esperanto. Ne sufiĉas la bulgaraj popolfabeloj. La allasitaj preseraroj malaltigas la valoron de la libro.

Konklude tamen mi povas diri, ke la libro estas bona helpilo por E-lernantoj: ĝi pliriĉigas iliajn lingvokonojn, alkitimigos ilin al pli facila vortfarado; pere de ĝi la kursanoj bone ekregos la parollingvon, pretigos transiri al pli alta grado de lingvoposedo.

Nedka VALJAVIČARSKA

KONTRIBUU AL "ROZO KAJ GLAVO"

Lige kun la centjara jubileo de la Internacia Lingvo kaj 80-jara datreveno de Esperanta poezio en Bulgario, Bulgara Esperantista Asocio eldonos imponan poezian antologion „Rozo kaj Glavo“, en kiu estos kolektitaj la plej belaj verkoj de ĉiuj bulgaraj poetoj-esperantistoj.

Tiu ĉi riĉenhava Antologio ne nur estos omaĝo al nia jam centjara literaturo, sed ĝi prezentos la originalan Esperantan poezion en Bulgario, kiu kvankam ne tre bone konata, abundas je problemoj, ideoj, temoj, respegulas la virtutojn de nia laborema popolo, la atingojn kaj sukcesojn de nia socialisma patrolando.

Por ke la Antologio estu kiel eble plej kompleta kaj plej detala el literatur-historia vidpunkto, ni petas ĉiujn bulgarajn Esperanto-poetojn sendi siajn novajn poemojn, kiuj meritas aperi en la Antologio. Kune kun la poemoj bonvolu sendi koncizajn biografiajn notojn laŭ jenaj indikoj:

1. Nomo (persona, patra, familia), literatura pseŭdonimo
2. Naskiĝdato, naskiĝloko kaj nuna adreso
3. Instruiteco
4. Profesio
5. Jaro de esperantistiĝo
6. Komenco de Esperanta traduka agado
7. Komenco de originala Esperanta verkado
8. Aperintaj verkoj en Esperantaj kaj bulgaraj revuoj (kiam, kie)
9. Aperintaj memstaraj libroj (jaro de apero, eldonejo).
10. Titoloj de aperintaj kaj neaperintaj originalaj poemoj.

Bonvolu sendi la samajn informojn (se vi disponas pri tiaj) pri niaj forpasintaj Esperanto-poetoj).

Ni esperas, ke la bulgaraj gepoj ne nur kontribuos la antologion „Rozo kaj Glavo“, sed ili faciligos kaj rapidigos ĝian redaktadon.

Bonvolu sendi viajn poemojn kaj biografiajn notojn laŭ adreso:

Bulgara Esperantista Asocio
1303 Sofio
bul. „Hristo Botev“ 97
Por la antologio „Rozo kaj Glavo“.

G. M.

GRATULOJN AL „ESPERANTISTO SLOVAKA“

Kun komprenebla kontenteco ni gratulas Stano Marček — la novan redaktoron de la frata revuo „Esperantisto Slovaka“ kaj ties redakciaĵojn pro la tute renovigita eldono de niaj slovakaj samideanoj!

En nia redakcio jam kelkajn monatojn alvenas la novaspektaj kalendaroj de tiu ĉiam kun granda intereso de ni legata revuo. Jam n-ro 5/1985 aperis kun nova, belaspekta kovrilo, arte aranĝita kaj altkvalite presita, sur pli bona papero — kun multaj legindaj materialoj en apartaj rubrikaj.

„... Mia ĉefa tasko nun estas kiel eble pli rapide produkti la restantajn ĉi-jarajn numerojn, kiuj espereble aperos unu post la alia ankoraŭ ĉi-jare. ... skribas en sia redaktora noto St. Marček. — Mi volis enkonduki ankoraŭ kelkajn novaĵojn, sed pro tempomanko mi restas „en la linio de mia unua numero“ kun la espero, ke en 1986 jam estos pli da tempo por „kreski kvalite“.

Ni sincere bondeziras al la redaktoro kaj al la redakta komitato realigi tiujn intencojn, por ke „Esperantisto Slovaka“ estu ĉiam riĉenhava, belaspekta, altnivela. ... Do, bonŝancon! ...

„BULGARA ESPERANTISTO“

El nia leterkesto

JAPANIO — MALPROKSIMA KAJ PROKSIMA“

La redakcio de „Bulgara Esperantisto“ kaj Vasja Cvetkova, la aŭtorino de la vojaĝimpresoj „Japanio — malproksima kaj proksima“ ricevis multajn leterojn de legantoj kun impresoj pri tiu interesa materialo. Ĉi-sube ni proponas al via atento fragmentojn el kelkaj el ili.

„Oni devas danki al la ĉefredaktoro de „Bulgara Esperantisto“ pro la interesaj rakontoj pri tiu fora lando — samtempe, malproksima kaj proksima“, kiel trafe vi nomis Japanion. Ja malmultaj esperantistoj havis la plezuron resti tiom longan tempon en la lando de la sunleviĝo. Se vi havas sufiĉan materialon, ĝi povus aperi en aparta libro, kaj mi esperas, ke ĝi ne estos enuiga! Tion realigi mi bondeziras al vi.“

Doc. Georgi DIMOV, Varna

„Ricevinte la laŭvican numeron de „Bulgara Esperantisto“, mi kun granda intereso kaj plezuro legis viajn allogajn vojaĝnotojn pri Japanio — nuntempa kaj antikva, „proksima kaj malproksima“, verkitajn en lingvo bonega, facila kaj komprenebla.“

Stefan STEFANOV, Varna

„Al mi kaj miaj kolegoj tre plaĉas via revuo „Bulgara Esperantisto“. Aparte mi volas substreki, ke tre grandan intereson ĉe la legantoj vekas publikigado sur ĝiaj paĝoj de vojaĝnotoj de esperantistoj. Ekzemple, la impresoj de Vasja Cvetkova pri Japanio estas tre interesaj pro ŝiaj sincereco kaj ege amikeca prezentado de japanoj, de iliaj kutimoj ktp. kaj ĉio en bonstila Esperanto.“

Aliaj vojaĝnotoj estas ankaŭ bonvenaj.“

Docento Vjaĉeslav HRŖMOV, USSR

„Mi ĝuas vian belegan priskribon de ĉi-vojaĝo en „Bulgara Esperantisto“. Leginte la ĵus ricevitan numeron, mi jam senpacience atendas sekvajn numerojn, ĉar „daŭrigota“ en krampoj signifas, ke la ĝuado estos longigita.“

Valentina ŜARABKOVA, USSR

„... Ankoraŭ unu interesa artikolo estas la komenco de longa vojaĝraporto de V. Cvetkova, gvida reprezentantino de la bulgara paca kaj virina movadoj, kiu estis invitita de la Japania Pacdefenda Esperantista Asocio. En bela Esperanto ŝi priskribas sian alvenon en Jokohamo kaj komencon de sia rondvojaĝo tra la pitoreskaj insuloj de Japanio, gastigata kaj gvidata de entuziasmaj gesamideanoj. Car mi ankaŭ havis tian neforgeseblan sperton pli ol unu fojon, mi estas bone kvalifikita por gratuli al la aŭtorino pro ŝia artikolserio kaj al „Bulgara Esperantisto“ pro ties publikigo.“

Jozefo MAJOR,

redaktoro de „Novzelanda Esperantisto“

HELPO PETATA

La Esperanto-grupo en Halle ĉe rivero Saale aranĝos sian 2-an letervesperon. Bonvolu skribi amase mallongajn leterojn ĝis la 1-a de septembro 1986, la Internacia Tago de la Paco, kaj sendu kolorajn bildkartojn de via hejmlando! Nia intenco estas ekspozicio okaze de la centjara jubileo de Esperanto en la jaro 1987. Per tiu ekspozicio ni volas demonstraci taugecon de Esperanto kiel Internacia Lingvo por popolinterkompreniĝo kaj strebado al paco.

Ĉiu sendaĵo estas respondota.

Nia adreso:

Kulturlogo de GDR Esperanto-Asocio
Urba Estraro Halle Leninallee 34
DDR — 4020 Halle



ALĜERIO

Benyahia Bouziane (19-jara) — c/o Benabdelana — lud Sidi Amar ghazaouet Willaya de Tlemcen — kun bulgaraj geamikoj, kolektas PM, kasedojn, revuojn

ANGLIO

Peter Weekley (55-jara, edziĝinta) — 64 Linden Crescent, Folkestone, Kent. CT19 5SB — kun geesperantistoj pri Esperanto, muziko de ĉiuj nacioj, poezio, pentroarto.

BRAZILIO

Valmir Tolicci (22-jara fraŭlo) — str. „Carlos Campos“ 626, Parque São Vincente Mauá. São Paulo — Brasil CEP-09300 — kun bulgaraj geamikoj pri ĉiuj temoj; interŝanĝas BK.

BULGARIO

Ivan Hristov (41-jara konstruisto) — 1220 Sofio, „Nadejda“ 11, bl. 239, vĥ. „V“ ap. 76 — pri tekniko, muziko, literaturo, turismo.

Nikolaj Georgiev (15-jara lernanto) — 8011 Burgas, kompl. „Meden Rudnik“ bl. 410 vĥ. „i“, et. 2 — kun samaĝuloj el ĉiuj landoj.

Du 12-jaraj lernantoj: Borislay Mateev — Botevgrad, str. „Cerven ploŝad“ 1 vĥ. A, ap. 18 — kaj Damjan Dakov — Botevgrad, str. „Georgi Vodeničarov“ 87, bl. 2, vĥ. A, kv. Saransk — kun geamikoj el ĉiuj landoj.

ĈEĤOSLOVAKIO

Ladislava Tlachova (26-jara fraŭlino) — 39 807 Orlik n/Vidavon, Probulov 47 — kun bulgaraj geamikoj.

FINNLANDO

Tapani Lappalainen (28-jara fraŭlo) — Kivalakotikylä, SF-37500 Lempäälä — pri muziko, filatelo; kolektas BK, PM, kasedojn.

JUGOSLAVIO

Du 16-jaraj lernantinoj: Jolana Kukučka — str. „Djuro Kiša“ 36, 22240 ŠID, kaj Gordana Ganyto — str. „Augustinčičeva“ 4, 22240 ŠID — pri ĉiuj temoj kun samaĝuloj.

RUMANIO

Gyula Vass (14-jara lernanto) — 4150 Odorheiu Secuiesc, Bd „Independentei“ 36, ap. 10, Jud. HARGHITA — kun bulgaraj geamikoj.

V. MITEV. Glora nacia epopeo	II
*** Pri la stato de nia asocio	1
*** Rezolucio de la Plenkunsido de CE de BEA	3
N. VALJAVIČARSKA. Sofia E-Domo de Kulturo „M. Gorkij“	4
Doc. G. DIMOV. Neforgesebla rememoro	5
M. BACEV. Intensa kurso de Esperanto	8
HO MO GO. En la lando de lotusfloroj	8
Esperanto en profesioj:	
C. TODOROV. Laboristo kaj sociaganto	10
Juna esperantisto:	
M. JANKOVA. Letero al ĉiuj	11
M. ELENOVA. Jam tradicia arango	11
A. KUNZLI. Varmaj renkontigoj	12
N. UZUNOV. Nova arta klubo	12
*** Poezio	13
*** Originala verkaro:	
N. NEDELČEVA. Muziko en malliberejo	14
*** Ni recenzas:	
V. MITEV. Emilijan Stanev en Esperanto	15
N. VALJAVIČARSKA. Postkursaj legaĵoj	15
G. MIĤALKOV. Kontribuu al „Roza kaj Glavo“	16
*** El nia leterkasto	16
*** Deziras korespondi	III
P. RAEV. Gastino el la Kosmo	IV

Sur la unua kovrilpaĝo:

„La flugrapida rajdantaro de Benkovski“ — oleopenraĵo de prof. D. Gjuĝenov (fragmento)

MEMORE AL VIKTOR OHRIMENKO

La 10-an de decembro 1985 forpasis unu el fondintoj de la E-klubo en urbo Zaporozĵe, veterano de la Granda Patrolanda Milito kaj de la E-movado en Ukrainio, esperantisto de 1924, Viktor Grigorjeviĉ Oħrimenko.

Li naskiĝis la 4-an de aprilo 1906 en urbo Dolinskaja, Ukraina SSR. Estante laboristo, li aŭtodidakte lernis la lingvon kaj atingis sufiĉe altan lingvoscion. Li multe propagandis Esperanton, gvidis E-klubon, edukis esperantistojn.

K-do Oħrimenko partoprenis konstruadon de du kanaloj (Balta kaj Fergana).

En la 50-aj jaroj li renovigis sian E-agadon kaj dum 10 jaroj gvidis la lokan E-klubon. Li havis vastan enlandan kaj eksterlandan korespondadon kaj multe helpis al siaj leteramikoj per konsiloj kaj per livero de libroj. Sian bibliotekon li testamente donacis al esperantistoj el urbo Moskvo.

Esperantistoj-samurbanoj de Viktor Oħrimenko kaj liaj leteramikoj ĉiam memoros lin.

Membroj de E-klubo „Amikeco“,
Zaporozĵe, Ukraina SSR

Ĉefredaktoro: Donĉo ĤITROV
Vicĉefredaktoro: Ĥaim LEVI
Respondeca sekretario: Lidia RAEVA
Redakta komitato: Marin BACEV, Mariana ELENOVA, Dimităr HAĜIEV, Krăstju KARUCIN, Georgi MIĤALKOV, Venelin MITEV, prof. d-ro Kiril POPOV
Teknika redaktoro: Ljubomir LAZAROV
Korektisto: Jordan ĈALJOVSKI
Administranto: Asen JOSIFOV

Revuo „Bulgara Esperantisto“ — fondita en 1919, distingita per ordeno „Kiril i Metodij“ — I grado Eldonkvanto — 6500 ekz.

Adreso de la redakcio:
„BULGARA ESPERANTISTO“
Bul. Ĥristo Botev 97

1303-Sofio, Bulgario P. K. 66
1000-Sofio
Ŝtata presejo „Georgi Dimitrov“, bul. Lenin 117

815TV



Gastino el la Kosmo

Post 76-jara vagado tra la Kosmo, la Haleja Kometo havis sian novan renkontigon kun la Tero. Ĉe ĉiuj siaj antaŭaj aperoj, inkluzive tiun en 1910, la kometo kaŭzis timon ĉe la homoj ne nur pro sia aspekto (granda, vila kaj vostoforma „monstro“ sur la fono de la senmova stelkovrita firmamento), sed ankaŭ pro sia subita apero.

Nur nun, ĉe ĝia nuna preterpaso, la atingoj de la nuntempa scienco ebligis al la astronomoj esti pretaj por la renkontigo kun la kosma gastino.

En sia laŭvica kongreso en 1982 la Internacia Astronomia Unuiĝo akceptis internacian programon por observado de la Haleja Kometo. La kometo estis proklamita unika astronomia fenomeno. En plenumo de tiu programo estis preparitaj jenaj projektoj: la japana „Planedo-A“, la okcidenteŭropa „Giotto“, la sovetaj „Venuso—Halej“ (mallonge—„Vega“) kaj la internacia kosma programo „Piloto“.

La japanaj sciencistoj direktis al la Haleja Kometo la aparatojn „Sakigata“ kaj „Sujsej“. „Sakigata“ esploris la kometon kvazaŭ deflanke, ĝi registris precipe donitaĵojn ligitaĵojn kun la suna vento, kiu, kiel konate, influas sur la konduton de la kometa vosto. „Sujsej“ interesiĝis pri la kometa krono kaj pri la elvaporigo de substancoj el ĝia kerno. Tio estis la japana projekto „Planedo—A“.

La rolon de unua violono en la kosma orkestro plenumis la sovetaj aŭtomataj interplanedaj stacioj „Vega-1“ kaj „Vega-2“. Dum sia 15-monata flugado, trapasinte distancon de 1 miliardo kaj 200 milionoj da kilometroj, la stacioj „Vega-1“ kaj „Vega-2“ esploris du kosmajn objektojn—la planedon Venuso kaj la Halejan Kometon. Dum la dua etapo de la eksperimento, la 6-an kaj la 9-an de marto 1986 „Vega-1“ kaj „Vega-2“ preterflugis je 8-9000 kilometroj de la kerno de la Haleja Kometo. Estis faritaj pli ol 1000 fotoj de la kometa kerno en diversaj zonoj de la optika spektro. Al la Tero estis senditaj unikaj donitaĵoj pri la fizikaj-kemiaj karakterizaĵoj de la kerno kaj pri la procezoj en la gasa-polva medio ĝin ĉirkaŭanta.

La flugo de la sovetaj aŭtomataj interplanedaj stacioj „Vega“ malkovris novan etapon en la esplorado de la leĝoj de formado kaj evoluo de la Suna Sistemo. Por unua fojo en la historio de la kosmonaŭtiko estis detale esplorita malgranda astro. La unikaj donitaĵoj pri la kometa substanco, ricevitaĵoj per rekta mezurado, havas grandegan sciencan signifon kaj plivastigos niajn sciojn pri la komencaj etapoj de formigo de la planedaj sistemoj kaj de la tuta universo.

La projekton „Vega“, kune kun la sovetaj sciencistoj, partoprenis ankaŭ sciencistoj el Aŭstrio, Bulgario, Ĉeĥoslovakio, GDR, FRG, Hungario, Pollando kaj Francio. La bonegaj specialistoj el tiuj landoj donis sian signifan kontribuon por la sukceso de la eksperimento.

La 11-an de marto 1986 finiĝis la laboroj de la internacia projekto „Piloto“, kiujn partoprenis sciencistoj el la Eŭropa Kosma Agentejo, el Sovet-Unio kaj el Usono. En la kadroj de vasta internacia kunlaborado, per la helpo de radioteleskopoj lokitaj en diversaj partoj de la terglobo oni fiksas la situon de la sovetaj aŭtomataj stacioj „Vega-1“ kaj „Vega-2“ kaj dank’ al la ricevitaĵoj de ili televidaj bildoj de la kometo, esti-



La lasta foto de la Haleja Kometo antaŭ ĝia trapaso tra la perihelio, farita en la Popola Astronomia Observatori apud Smoljan la 14-an de januaro 1986.

ĝis ebla tuja korekto de ĝia traektorio. La utiligo de la donitaĵoj ricevitaĵoj dank’ al la kosmaj kaj surteraj mezuradoj permesis kelkdekfoje plialtigi la ekzaktan difinon de la situo de la Haleja Kometo kaj konduki la proksimigantan al ĝi okcidenteŭropan aŭtomatan interplanedan stacion „Giotto“ je distanco de ĉirkaŭ 500 km de la kometa kerno, kun meza eraro de 80 km. En la nokto de la 13-a kontraŭ 14-a de marto 1986 „Giotto“ pasis tra la kapo de la Haleja Kometo. Sur la ricevitaĵoj de ĝi fotoj, la kometa kerno aspektas kiel homogena korpo kun malregula formo, longa ĉirkaŭ 11 km kaj larĝa ĉirkaŭ 7 km. La sciencistoj supozas, ke ĝi estas glacia formajo kovrita de polvokrusto.

Kia estas la bulgara partopreno en tiu ampleksa sciencia programo? La bulgaraj sciencistoj senpere partoprenis la kreon de la projekto „Vega“, la analizon de la sciencaj rezultoj. Kune kun sovetaj kaj francaj specialistoj ili partoprenis la projektadon kaj ellaboron de trikanala spektrometro — unu el la plej gravaj aparatoj en la komplekso, kiu mezuris la reflektitan kaj propran lumon de la kometo en la ultraviolavidebla kaj infraruĝa partoj de la spektro. Bulgara kontribuo al la projekto estas ankaŭ signifa parto de la surtera elektroniko, pri kio grandan meriton havas la bulgara firmao „Izot“. Sian kontribuon havas ankaŭ la problema grupo „Dinamiko de la Ĉielaj korpoj“ ĉe la Astronomia Sekcio de Bulgara Akademio de Sciencoj. Rezulte de kelkjara laboro estis ricevitaĵoj tre bonaj rezultoj: en la Popola Astronomia Observatorio apud Smoljan oni faris fotojn de la Haleja Kometo — pli ol 250. La pliparto el ili estis prilaboritaj kaj senditaj en la koordinajn centrojn en USSR kaj en Usono kaj kontribuis por efektivigo de la flugoj de la aŭtomataj interplanedaj stacioj „Vega“ kaj „Giotto“.

Desur tri punktoj de nia planedo komencis sian vojon al la Haleja Kometo la teraj senditoj — la japanaj „Sakigata“ kaj „Sujsej“, la sovetaj „Vega“ kaj la okcidenteŭropa „Giotto“. Tio estis bonega ekzemplo de fruktodona kunlaborado por paca ekposedo de la kosma spaco. Estis realigita detala sciencia esploro de la kosma gastino. Nun antaŭstaras longa obstina laboro por analizado de la ricevitaĵoj donitaĵoj. Sendube, niaj scioj pri la kometo plimultiĝos, aperos novaj teorioj kaj hipotezoj, novaj projektoj... Ja post 76 jaroj la Haleja Kometo denove gastos al la Tero!

Inĝ. Petr RAEV